REGO

☆ RUSIA ESPERANTO-GAZETO ☆

movada revuo *№ 4-5 (101-102) oktobro 2017*

la E-karavano en Moskvo

en la numero

rememoro pri Ora SEJT
rakontoj kaj impresoj pri RET-2017 kaj E-karavano al Seulo
forpasis Mikaelo Giŝpling kaj Marjorie Boulton
tradukoj de versaĵoj de M. Cvetajeva kaj A.K. Tolstoj
rezultoj de la Belartaj Konkursoj de UEA

Moskvo, 2017

enhavo

01 Rememoro pri Ora SEJT (L. Novikova)

05 La tria, sed ne la lasta... (T. Loskutova)

11 Poŝeĥonje – Bjelovar: parto de la E-somero (M. Bronŝtejn)

13 Antaŭ RET-2107 (kanto de M. Povorin kaj K. Ilutoviĉ)

14 Bulteno de REU (materialoj el la septembra kaj oktobra numeroj)

29 Unesko-Kuriero en Esperanto eldoniĝis

29 Nova honora membro de UEA

30 UEA diplomigis 8 elstarajn agantojn

31 Forpasis Mikaelo Giŝpling (R. Kudrjavceva)

34 Rezultoj de la Belartaj Konkursoj de UEA

35 Marina, Marina – rusia dolor' (L. Novikova)

40 Versaĵoj de Marina Cvetajeva en tradukoj de L. Novikova kaj T. Auderskaja

50 Versaĵoj de A.K. Tolstoj en tradukoj de K. Ilutoviĉ

51 M. Jemcev, J. Parnov. Revenigu la amon (fino)

k3 Forpasis Marjorie Boulton

k3 Forpasis Aleksandr Kotelnikov

k4 REU establas la fonduson "Subteno de laboro pri la vortaro de B. Kondratjev"

k4 Informo por la abonatoj kaj legantoj de REGo



Mikaelo Giŝpling
(1924-2017)

REGo
(Rusia Esperanto-Gazeto)
№ 4-5 (101-102) oktobro 2017
aperadas ekde 2000

redaktas **Georgij Kokolija**
kunredaktas **Viktor Aroloviĉ**
kunlaboras **Maksim Griŝin**

poŝta adreso: Pjatnickoje ŝosse 45 – 105
125310 Moskvo, Rusio
retadreso: gazeto@mail.ru

ATENTON: ekde la jaro 2018 REGo ne plu aperados.

REMEMORO PRI ORA SEJT

Antaŭ kvardek jaroj, dum la 01-a – 10-a de aŭgusto 1977 apud la urala urbo Miass okazis OrSEJT-19, organizita far la anoj de la Miassa E-klubo "Malaĥita Stelo" laŭ komisio de la SEJM-Komitato. Mi estis unu el la organizintoj de la tendaro.

Nun la iamaj organiz-strukturoj de la sovetia junulara E-movado iĝis historiaj, pro kio necesas klarigi kelkajn siglojn kaj faktojn por la novaj generacioj de la rusiaj esperantistoj.

SEJM – Sovetia Esperantista Junulara Movado. SEJT – Sovetia Esperantista Junulara Tendaro. OrSEJT – Orienta SEJT. En 1976 la Konferenco de SEJM akceptis decidon dividi la tradiciajn ĉiujarajn somerajn SEJT-ojn je du partoj: orienta (OrSEJT) kaj okcidenta (OkSEJT) pro tro granda kvanto de partoprenantoj por unusola aranĝo.

Do, la unua OrSEJT (la vicnumeroj de la tendaroj estis pludaŭrigataj) okazis sur bordo de la lago Turgojak, kiun oni nomas "perlo de la Suda Uralo" kaj "pli juna frato de Bajkalo" pro kristala pureco de ties akvo kaj belega aspekto.

Kial mi nomas la tendaron "ora"? Krom la sprita malĉifro de la siglo OrSEJT, proponita de iu el la tendaranoj, la vorto "ora" estas ligita ankaŭ kun la metafora kromnomo de la urbo Miass – "Urbo en la Ora Valo", ĉar dum pluraj jarcentoj apud Miass funkciis (kaj plu funkcias ĝis nun) oraj minejoj.

Mi revenas memore al tiuj neforgeseblaj tagoj. La tendaro estis vere turisma, t.e. ni loĝis en tendoj naturkondiĉe (en arbaro surborde de la lago). Ĉio estis organizita pere de la Ilmena turista bazo, kiu ne nur disponigis al ni la necesan ekipaĵaron (tendojn, dormosakojn, manĝilaron, provianton k.a.), sed ankaŭ disdonis al ĉiuj partoprenintoj de la tendaro insignojn kun

V.Dobridina kaj E.Perevertajlo

oficialaj atestiloj “Turisto de USSR”. Ŝajne, ni meritis tiun honorigon, ĉar ni pasigis la antaŭtendaran Paroligan periodon en formo de turisma marŝado: ĉiuj tendaranoj estis dividitaj je ok grupoj po 15 homoj, kiuj dum tri tagoj iris laŭ la planita por ĉiu grupo aparta itinero, paŝante tra densa arbaro, grimpante rokojn, preparante memstare manĝaĵon sur lignofajroj. La celo de marŝado estis paroligi la novicojn en izolitaj kondiĉoj per metodo de “mergado”: la grupoj estis kompilitaj tiel, ke duono de la grupanoj estis sifiĉe lingve spertaj, la alia duono – malspertuloj. Tre efika metodo! Ne eblis kaŝe krokodiladi kiel en la grandamasaj aranĝoj. La grupojn gvidis po du grupestroj: unu el ili estis ĝenerala organizanto, la alia – turista gvidanto (loka esperantisto, anticipe provspertinta la itineron).

Al ĉiu grupo estis donita speciala “gema” nomo, kiu estis ligita kun la specifo de la regiono, fama pro la Ilmena natura mineralogia rezervejo. La Naturo mem kolektis en tiu ĉi loko specimenojn de ĉiuj mineraloj, gemoj kaj ercoj de valoraj metaloj, ekzistantaj ne nur sur Tero, sed eĉ ekster ĝi (kiamaniere la “eksterteruloj” trafis ĉi tien, demonstris en februaro de 2013 t.n. “Ĉeljabinska meteorito”, kiu falis en la lagon Ĉebarkulj apud Miass, – do estus pli juste nomi ĝin “Ĉebarkula meteorito”). Ŝajne en tiu ĉi regiono ekde pratempoj estas “meteoritodromo”. Do, niaj grupoj portis nomojn de valoraj gemoj kaj metaloj: “Topazo” (grupestro L.Novikova), “Malaĥito” (V.Dobridina), “Smeraldo” (V.Aroloviĉ), “Turkiso” (V.Ebel), “Ametisto” (E.Perevertajlo), “Diamanto” (B.Anoĥin), “Oro” (N.Korĵenevskaja), “Arĝento” (D.Mametova). Kiel ni vidas, ĉiuj grupestroj estis aktivuloj de tiama SEJM, pluraj el ili aktivas en la movado ĝis nun. Krom la menciitaj ne eblas ne memorigi pri tiaj famaj esperantistoj kiel B.Kolker, N.Cvileneva, L.Borisov, A.Aleksandrov, V.Vjazovcev, A.Ionesov, V.Kudrjavcev, G.Gazizov, A.Korĵenkov, V.Izosimov, Z.Skvorcova, I.Fejgin, L.Gindin, A.Medinŝ, L.Geiba... Mi rememoras ĉiujn kun dolĉamara sento. Ili tiom multe donis al la movado, al nia tendaro, al mi persone! Mia koro plenplenas de ama sento al ili. Sed pluraj el ili jam por ĉiam forlasis nin, vivantojn, kaj pro tio la koro ĝemas.

B.Anoĥin, A.Aleksandrov, V.Moŝkina, L.Novikova, L.Borisov

Mi ne povas ne rememori ankaŭ miajn samurbanojn, esperantistojn de Miass, kiuj dum tuta jaro penegis plej bone organizi la tendaron. Vera Dobridina (nun Poliŝĉuk) – sen ŝiaj klopodoj okazus nek la turismaj marŝoj, nek la neforgesebla

velboatado tra Turgojak, nek sportaj konkursoj; Tatjana Koptjagina – “patrino” de la tendaro, zorginta pri la sekretariaj kaj multaj aliaj aferoj; Vera Moŝkina – ĉarma Mastrino de la Kupra Monto, la unua salutinta la tendaranojn kaj disdoninta memordonacojn al ili el sia Malaĥita skatolo; Vladimir Hrebenjuk – majstre farinta fotojn de la tendaraj aranĝoj, restintaj por la historio de la movado; bravaj turistaj gvidantoj de la grupoj: Valerij Maliŝev, Anatolij Mitrofanov, Vladimir Ŝĉennikov, Lubovj Suĥorukiĥ, Natalja Kalik (nun Sporiĥina).

Specifa trajto de la tendaro estis kanta atmosfero. Ni kantis senĉese: dum la turisma marŝo, dum la solena malfermo de la tendaro, dum speciala programero – instruado de kantoj, dum la belarta konkurso “Oriento”, dum duversaj aliaj aranĝoj, kaj certe – ĉiuvespere ĉe lignofajro. Kelkaj kantoj estis verkitaj speciale por la tendaro, inter ili la populara ĝis nun “Oriento”. Por ĉiu turista grupo estis preparita speciala kanteto konforme al la grupnomo. Mia “Topazo” gaje kantis:

Top-top-topas la “Topaz’”,
Povus marŝi ni eĉ ĝis Kaŭkaz’,
Tamen ne allogas nin Kaŭkaz’,
Ĉar pli belas la Ilmena baz’.

Dum la solena malfermo de la tendaro ni salutis la partoprenantojn per jena kanto:

Geamikoj niaj gloraj,
Vin salutas en ĉi horo
Ĉe la lago Turgojako
Niaj koroj kaj la brakoj!
Ĉe belega nia lago
Vin atendas sunaj tagoj
Kaj plezure granda dozo
De laboro kaj ripozo.

La ĉiutagan instruadon de E-kantoj gvidis la neforgesebla Ljonĉjo Borisov, ankaŭ ĉiuj aliaj kantaj programeroj pasis kun lia nepra partopreno.

En kadroj de la tendaro estis lanĉita la belarta konkurso “Oriento”, kiu transiris al ĉiuj postaj OrSEJToj. Kerno de la konkurso estis samtitola kanto “Oriento”, kiun mi verkis speciale por la tendaro. Min inspiris kaj la belega urala naturo, kaj la fabeloj de P.Baĵov, kaj nia kara esperantista amika rondo:

Farbis montan randon per tenera rozkolor’,
Kaŝinte stelojn sorĉistin-aŭror’,
Kaj vekiĝas lante post tranokto la natur’,
Sin lavas per manpleno de lazur’...
Oriento, Oriento, Orient’, aŭrora mia land’,
Oriento, Oriento, Orient’ – pri vi matena kant’.

En la tendaro ĉiutage post matena gimnastiko kaj matenmanĝo okazis Somera

universitato, kies rektoro estis Viktoro Aroloviĉ kaj inter la “profesoroj” – la fama Boris Kolker. Funkciis ankaŭ tradukista kurso, legejo (en rekta senco; la metaforaj “legejoj” sin kaŝis en apartaj tendoj vespere kaj nokte, pri kio humure rememoras Aleksander Korĵenkov sur paĝoj de “VKontakte”). Post tagmanĝoj estis ne tiom seriozaj, sed plenaj de plezuro kaj gajo distraj aranĝoj. La plej memorinda estis la festo de Neptuno. La Reganton de la maroj brile rolis Boris Anoĥin, kiu venis kun sia sekvantaro al la tendarejo per velboato kaj alportis barelon kun surskribo “Oro”. Li trovis la barelon sur fundo de la lago, kien laŭ la loka legendo ĝin iam ĵetis Jemeljan Pugaĉov. Ial neniu miris, ke la surskribo estis en Esperanto, sed ĉiuj ĝojmiris, kiam oni malkovris la barelon: tie anstataŭ oro estis biero, kiun oni volonte trinkis dum la festo. Multis aliaj gajaj festoj: Konkurso de Gajaj kaj Spritaj, Tago de naskiĝtaguloj, Rida vespero kaj fine – la Adiaŭa balo, kie estis elektitaj “Miss kaj Mister Esperanto” (la ĉarma riganino Lolita Geiba kaj la glora Boris Anoĥin). La mastrino de la Kupra Monto kaj Danilo-Majstro transdonis al ili siajn orajn diademojn.

Entute la tendaron partoprenis 125 esperantistoj el 30 urboj de USSR.

Bedaŭrinde mia memoro ne sukcesis teni ĉion, ligitan kun la tendaro. Mi ne memoras ĉiujn nomojn de la partoprenintoj, eĉ la nomon de rolulo de Danilo-majstro mi nun ne povas rememori. Antaŭe jam estis publikigita en REGo memoraĵo de Viktoro Aroloviĉ, en kiu li mencias ankaŭ nian tendaron (№ 2 (93), p. 15-16 – *La red.*). Mi dezirus, ke la partoprenintoj, kiuj nun legas tiun ĉi artikolon, reeĥu, verku kaj publikigu siajn memoraĵojn, eble korektu erarojn de mia memoro. La Ora SEJT meritas resti en la historio de nia movado kiel eble plej komplete.

Ludmila Novikova (Moskvo)

LA TRIA, SED NE LA LASTA…

La pasintan julion eblis festi siaspecan jubileon: pasis 10 jaroj ekde la unua ĉi-jarcenta Esperanto-Karavano (EK) tra Rusio al E-kongresoj. Pri ĝi kaj pri la du sekvaj oni povas konatiĝi tra prismo de rememoroj kaj fotoj de kelkaj ĝiaj partoprenintoj en <www.esperanto-karavano.info>.

Tamen en ĉi artikolo mi prezentu iom la ĉi-jaran EK-on, kiu komenciĝis en Sankt-Peterburgo (SPb) kaj al kiu venis pli ol duono de la karavananoj. Entute la vojaĝon ekde SPb ĝis Seulo, kie estis okazonta la Universala Kongreso, partoprenis 40 personoj (iuj (mal)aliĝis survoje) el 7 landoj: Belgio, Bulgario, Germanio, Francio, Rusio, Svislando kaj Usono.

Sankt-Peterburgo. La unuan fojon la karavano startis en la norda ĉefurbo, kaj memkompreneble estis multaj maltrankvilaj momentoj: ĉu ĉio planita realiĝos? Por ke la restado de niaj E-gastoj estu sukcesa, jam antaŭ multaj monatoj estis ellaborita kaj kun lokaj esperantistoj interkonsentita la kultura programo, kies nepra ero, t.n. interkona vespero, okazis dum la unua vespermanĝo en urba kafejo kun gitarludo kaj kantoj de Mikaelo Bronŝtejn kaj Vladimir Kosarev. Sekvatagan ŝipvojaĝon al la ĉarmega Peterhof kaj viziton al la mondkonata Ermitejo akompanis kaj kompetente ĉiĉeronis Svetlana Mirosniĉenko, kiu alvokadis helpon de ĉielo por suna vetero dum la eksterurba vizito. Feliĉe, ŝiaj (ankaŭ la niaj) esperoj realiĝis. Laciga tago... tamen vespere ĉiuj direktis sin al la Petro-Paŭla fortikaĵo. Tie peterburgaj E-klubanoj organizis tre varman akcepton por la EK-anoj. La prezentita majstra koncerto de la ensemblo «Blua Ponto» (gvidantino Ludmila Titova) elvokis ardajn aplaŭdojn de la aŭskultantoj, kaj posta gustumado de rusaj dolĉaĵoj kun teo kontribuis al pli proksima interkonatiĝo de ĉiuj ĉeestantoj. Ĉi-loke necesas mencii sukcesan organizan rolon de la prezidantino de la E-klubo «Kariljono» Svetlana Ejst dum akcepto de la eksterlanda E-grupo en SPb kaj konsiderindan subtenon de s-ro Jozef Willem E.F. Haazen – belgo, ĉefa eŭropa kariljonisto, jam de kelkaj jaroj loĝanta en SPb kaj laboranta en Sankt-Peterburga Universitato, de junaĝo E-parolanta, kiu varme kaj bonkore bonvenigis la gastojn en la sino de Petro-Paŭla fortikaĵo, nuna E-sidejo. Sekvatage – busa kaj pieda ekskurso tra la urbo, dum kiu Viktoro Kandalinskij plensukcese konatigis la gastojn kun ĉefaj vidindaĵoj de SPb, la kultura centro de nia lando. Promeno laŭ kanaloj kaj laŭ la Neva-rivero en tegmentita ŝipeto estis bona solvo daŭrigi konatiĝon kun la urbo dum pluva kaj ventema vetero. Malgraŭ sufiĉe streĉa programo kelkaj karavananoj sukcesis memstare promeni tra la urbo, kaj la plej kuraĝaj dumnokte spektis en proksimeco (mal)leviĝon de la Litejnij-baskulponto. La matenon antaŭ la forveturo al Moskvo kelkaj gastoj vizitis malgrandan lokan ortodoksan preĝejon, en kiu la paroĥestro rakontis al la vizitintoj pri la historio de la preĝejo, kelkaj ortodoksaj religiaj tradicioj kaj ceremonioj, respondis al iliaj demandoj.

Arkitekturaj monumentoj de diversaj epokoj kaj stiloj, belaj kajoj de la Neva-rivero, majestaj palacoj, katedraloj kaj unikaj pontoj, monumentoj kaj aliaj vidin-

daĵoj lasis neforgeseblajn impresojn pri la vizito al Sankt-Peterburgo.

Moskvo. La kvarhora dumtaga trajnveturo ĝis Moskvo per «Nevskij ekspress» pasis preskaŭ nerimarkite. Kaj jen sur la kajo de Leningrada stacidomo en la rusia ĉefurbo la grupon renkontas moskvaj esperantistoj. Enhoteliĝinte (intertempe alvenis pliaj EK-anoj, kiujn en flughavenoj renkontis moskvaj esperantistoj) ni vespermanĝis en russtila restoracio konstruita el ligno. Unu el ĉefaj eroj de la moskva programo entenis viziton al Kremlo dugrupe kun sperta ĉiĉeronado de Nikolao Gudskov kaj Natalia Aroloviĉ. Sub senĉesa pluvo kaj sub ombreloj la grupanoj paŝadis observante majestajn katedralojn kaj diversajn vidindaĵojn de la plej antikva kaj centra parto de Moskvo, ĝia «koro», kie troviĝas la oficiala rezidejo de la prezidento de Rusio. Eksterplane kaj bonŝanĉe por ni ĉiuj aperis ebleco spekti sur la ĉefa placo sabatan prezentadon de kremlaj gvardianoj kaj kavaleria eskorto de la speciala honora prezidenta regimento. Malgraŭ kontinua pluvo ni staris duonhore, fascinitaj de ilia modela marŝado kun armiloj, de komplika defilado, admiris ĉevaldresadon je muzika akompano de la prezidenta orkestro... La sekvantan tagon la grupanoj ekskursis enbuse tra Moskvo elirante ĉe rimarkindaj kaj vidindaj lokoj de la rusia ĉefurbo aŭskultante kompetentajn klarigojn de N. Gudskov. La posttagmeza vetero, finfine senpluva kaj kun ioma sunbrilo, favoris krozadon laŭ la Moskva-rivero. Kaj vespere ni ĉiuj akompane de lokaj esperantistoj vizitis la teatron «Rusa Kanto», kiu proponis konatiĝi kun la historio de nia multnacia ŝtato kaj la vivo de ĝia popolo pere de majesta kaj impona danca spektaklo. Virtuoza tekniko de 50 profesiaj artistoj, perfekta aktora majstreco, neordinaraj kostumoj kaj dekoroj ne lasis la spektantaron indiferenta. La restado en Moskvo finiĝis per vizito al la muzeo de la rusa vodko proksime de la hotelo «Izmajlovo», kie loĝis plejparto de la grupanoj. Fine de la vizito oficistoj de la muzeo proponis al la vizitantoj gustumi la mielvinon «medovuĥa», iom alkoholizitan trinkaĵon, konatan en Rusio de pratempoj. Niaj gastoj aprezis originalecon de la nacia trinkaĵo pro ĝia mildeco kaj miela aromo.

Trajnumado. Kaj jen ni estas ĉe vagonoj surkaje de Jaroslavla stacidomo

por starti al Irkutsk. Jam atendataj de konduktoroj kaj de la trajnestro ni envagoniĝas. Dum la lastaj jaroj ĉe rusiaj fervojoj okazis multaj pliboniĝoj en priservo de pasaĝeroj kaj aperis novtipaj vagonoj. Ni veturis en t.n. vagonoj de plialtigita komforto. Veturo en tuj vagonoj antaŭvidas molajn kuŝlokojn (do oni ne plu uzas matracojn) en 4-personaj kupeoj kun instalitaj elektroŝtopilingoj, du tualetejoj kun bionecesejoj troviĝas fine de la vagono. En unu el la tualetejoj eblas duŝi sin dumvoje. Varma manĝo elektita el la menuo estas servata surloke unu fojon dumvojaĝe: ĝi estas inkluzivita en la prezon de la trajnbileto.

Laŭ anticipa interkonsento la EK-anoj okupis siajn lokojn en vagonoj, kaj komenciĝis la trajnumado, kiu longis 5160 km tra 5 horzonoj. Certe, ĉiuj interesiĝis pri preteveturataj urbetoj kaj vilaĝoj, kampoj kaj arbaroj, tial oni multe fotis. Poiome troviĝis aliaj okupiĝoj kaj la pasaĝeroj komencis jen interparoli, jen legi, jen lerni Esperanton, ĉu farante gramatikajn ekzercojn, ĉu kantante. Kelkaj kunpenis tekkomputilojn kaj pasigis la tempon pretigante siajn prelegojn por la UKo ktp. La apuda vagono-restoracio funkciis ĝis malfrua vespero, tial oni povis tie maten-, tag- kaj vespermanĝi. Niaj gastoj estis kontentaj je bongustaj pladoj, kiujn kuiristino lerte pretigis en malvasta spaco de la vagonrestoracia kuirejo. Tamen ne mankis ebleco aĉeti certajn manĝaĵojn surkaje dum relative longaj trajnhaltoj. Boligita akvo estis en ĉies dispono je iu ajn tempo, kaj ebleco trinki teon/kafon el famaj glasoj en metalaj glasingoj estis bonvena.

Krasnojarsk. Matene la 13-an de julio nia trajno alvenis al la urbo Krasnojarsk. Surkaje ni jam estis atenditaj de lokaj esperantistoj, kiuj amase venis saluti la karavananojn. Interkonatiĝoj, intervjuoj, fotiĝoj... Surpriza estis por mi la ĉeesto de Vladimir Sapoĵnikov, iama aktiva SEJM-ano. Nun Vladimir reaktiviĝis kaj prezidas la urban E-klubon. Relative longa, 40-minuta halto, rapide traflugis, kaj jen sonas emocivekaj ĝisrevidoj kaj adiaŭoj... Kaj envagoniĝo por daŭra trajnumado.

Irkutsk. Surperone ni estis renkontataj de reprezentantoj de la loka turisma agentejo, kiu ĉiufoje akceptas niajn EK-anojn. Post perbusa kaj iom perpieda ekskurso tra la urbo kun loka ĉiĉeronino ni tagmanĝas kaj ekveturas direkte al la Bajkal-lago. Bonŝance estas suna kaj varma vetero, tial ŝipumado laŭ la suda parto de la lago estas agrabla. Ĉi-foje nia ŝipeto estas pli luksa: eblis ne nur trinki kafon/teon aŭ glaseton da vodko, sed ankaŭ ripozi/kuŝi surlite en kajutoj. Tamen anstataŭ ripozo ĉiuj preferis resti sur la ferdeko por ĝue admiri vastecon de Ba-

jkal. Ĉirkaŭirante la halon de la ŝipeto oni rimarkas surmure fotojn de famuloj kaj elstaraj personoj, kiuj navigis per ĉi ŝipeto, i.a.: rusa klasika pianisto-virtuozo Denis Macujev, germana ekskanceliero Helmut Kohl k.a. Iomgrade lacaj ni estis pro iom neatendite longa navigado (iuj teknikaj kaj veteraj problemoj – komencis pluvi), post kiu nia ŝipo jam en plena mallumo albordiĝis tiuloke, kie nin atendis du minibusetoj. Per ili ni veturis ĝis la turisma bazejo, t.e. du komfortaj domoj en siberia vilaĝo, kie nin atendis vespermanĝo. Du tagoj en landinterno – nerimarkite niaj EK-anoj trafis en Burjatan respublikon, administran regionon de Rusia Federacio – estis plenŝutitaj de la zorgeme preparita programo: baniĝo en varmaj fontoj (de +50 ĝis +60 °C) de la kuracloko Arŝan, vizito al Lamaejo – budhisma monaĥeja universitato ĉe rusiaj burjatoj, promeno tra bazaro de burjataj metiproduktaĵoj, vojaĝo al la Sobolinaja (zibela) monto, supreniĝo per funikularo je 900 m kaj superrigarda panoramo de la Bajkal-lago de alteco de birda flugo kaj posta vizito al loka bazaro por aĉeti ĵus kolektitajn ĝardenajn fragojn, kiuj abundis en ĉi regiono.

Reveninte al la bazejo, ĉe ĝia sojlo la grupanoj ekaŭdis sonon de akordiono kaj ekvidis homojn en rusaj naciaj kostumoj, unu el kiuj proponis gustumi la tradician rusan «panon kun salo». Tiamaniere surkorte de la bazejo inter betuloj komenciĝis unuhora koncerto de koruso de veteranoj, kiuj speciale venis el Irkutsk. La prezentitaj rusaj kantoj meritis varman akcepton kaj sincerajn aplaŭdojn de la eksterlandaj aŭskultantoj, kiuj siavice prezentis ankaŭ kelkajn kantojn en siaj naciaj lingvoj. Kaj poste, jam adaptiĝinte al la gaja situacio, entuziasmigitaj de verva muziko de akordiono kaj balalajko niaj gastoj ekdancis invitite de korusanoj. Kortuŝa elpaŝo de rusiaj estimindaĝaj veteranoj kaj postkoncertaj interparoloj kun ili lasis varman impreson en ĉies animoj.

En la programo de la restado en la regiono estis promeno ĝis la Bajkal-lago, kiu tute apudis, kaj baniĝo en la lago. Ĉiuj plezure iris al la lago tra arbaro kolektante survoje mirtelojn, sed ne ĉiuj kuraĝis plonĝi en la sufiĉe malvarman akvon. Vespere la gastoj povis sperti russtilan banejon aŭ pli kutiman saŭnon.

Denova trajnumado. La Bajkal-laga regiono adiaŭis nin «kun larmoj», t.e. denove pluvis. Ni envagoniĝis en la stacio Sljudjanka, kies stacidomo estas unika en la mondo, ĉar ĝi estas konstruita el marmoro. Vanis klopodoj de la staciestrino aranĝi venigon de nia trajno al la unua kajo. Tial ni ĉiuj devis grimpi laŭ alta ŝtuparo kaj poste descendi al la bezonata kajo. La envagoniĝo estis relative rapida,

ĉar la preterveturanta trajno ne haltis porlonge. Ekde tiu momento la trajnvojaĝo ne plu estis io nekonata, tial la jam vojaĝspertaj EK-anoj okupis, kiel antaŭvidite, la samnumerajn kupeojn, sed kun novaj konduktorinoj, kaj aperis tempo por interŝanĝi opiniojn pri la restado ĉe la Bajkal-lago. Plian vojon distance je 4110 km oni traveturis en vagonoj de la trajno «Moskvo-Vladivostoko»...

Vladivostoko. Frumatene la 20-an de julio en ĉi for-orienta urbo la grupon surkaje renkontis du lokaj esperantistoj, kiuj helpis veturigi niajn valizojn al la hotelo. Post matenmanĝo ni kunvenis en la biblioteko de la regiona geografia societo, kie rezidas la loka E-klubo «Pacifiko», por du mallongaj E-prelegoj. La prezidanto de la E-klubo Gennadij Ŝlepĉenko kaj klubano Ljubovj Karpeta prelegis pri «Historio de Vladivostoko» kaj «Laŭ spuroj de Laperuz-ekspedicio». Post la prelegoj ĉiuj EK-anoj povis konatiĝi kun unikaj E-libroj eldonitaj komence de la pasinta jarcento kaj nun gardataj en tenejo de la biblioteko. Traurba ekskurso (denove subpluve!) venigis la esperantistojn al la vidindaĵoj pleje vizitataj de turistoj: memoriga gvardia submarino S-56 kaj eksteraj eksponaĵoj de milit-historia muzeo de marfloto, triumfarko de carido (konstruita honore al vizito de estonta rusa caro al Vladivostok) kaj antikva luterana kirko, panorama placeto de Vladivostoko. Al la lasta oni veturis per funikularo kaj urba buso, kio estis neordinara sperto por la eksterlandanoj: en vladisvostokaj busoj oni pagas buskoston al la ŝoforo fine de la vojaĝo forlasante la buson tra la antaŭa/unua pordo. Vespere en la sama salono de la geografia societo okazis koncerto de la ukraina popola ensemblo «Gorlica». Antaŭnelonge la ensemblo festis sian 35-jariĝon. Ĝiaj partoprenantoj konservis popolajn tradiciojn kaj folkloron de siaj prauloj, transloĝiĝintaj al ĉi regiono el Ukrainio antaŭ pli ol 100 jaroj. Ravitaj de buntaj kostumoj kaj belaj voĉoj, de riĉe prezentita repertuaro de la ensemblo ni dankis la artistojn per niaj ardaj aplaŭdoj. Postkoncerta regalo flanke de gekorusanoj per «gorilka», ukraina vodko, estis surprize agrabla.

La postan tagon ni veturis tra la urbo per speciale mendita turisma buso jam trafenestre observante la urbajn vidindaĵojn kaj multaloke riparatajn stratojn kaj placojn. Apartan intereson kaŭzis veturo laŭ siaspeca pendoponto «Russkij» (Rusa), kiu malfermiĝis en 2012 trans la golfeto Zolotoj Rog (Ora korno), kunligante Vladivostokon kaj la insulon Russkij. Ĝi estas la plej granda tiuspeca ponto en la mondo, kaj pro tio ĝi eniris en la dekon de la plej interesaj turistaj lokoj en Rusio. Sur la insulo Russkij troviĝas Ĉemara oceanario, la celo de nia busekskurso. Malfermita por vasta publiko septembre 2016, ĝi estas unu el la plej grandaj ĉi-specaj similaj objektoj en la mondo. Vasta ekspozicia konstruaĵo aspektas kiel konko, kies grandeco mezuriĝas per 150 metroj de larĝo kaj 35 mil kvadrataj metroj de areo. Vere vidinda kaj admirinda loko, elvokanta amason de pozitivaj emocioj, kie aŭtentikas oceana atmosfero. Endas reveni...

Kronis la restadon en Vladivostoko kaj la finon de la vojaĝo tra Rusio komuna vespermanĝo kun lokaj esperantistoj en unu el ĉekajaj kafejoj sur bordo de Amura

golfo. Reciprokaj dankvortoj interplektiĝintaj kun gustumado de ŝaŝliko, E-kantoj, tinteto de glasoj kun iom da vodko, interparoloj de jam interamikiĝintaj gekaravananoj, porpacaj tostoj sonis ĝis malfrua vespero...

La 22-an de julio ekde mateno la EK-anoj dugrupe ekflugis al Seulo...

La tria Esperanto-Karavano finiĝis. Organizo de simila vojaĝo estis nefacila afero por tiom granda grupo, diversaĝa kaj diversnacia, kies membroj havis ne ĉiam samajn interesojn, fizikajn kaj sanstatajn povojn, E-lingvonivelojn. Tamen mi konscias kaj alte aprecas toleremon de la grupanoj al problemoj, kiujn ni renkontis dum nia vojaĝo, komprenemon ĉe neordinaraj situacioj, kiujn ili spertis, ilian ardan deziron ekvidi laŭeble plej multon kaj sperti ĉion la plej nekutiman kaj novan. Notindas, ke granda plimulto el la EK-anoj profitis la tempon de nia internacia vojaĝo por perfektigi sian E-lingvoscion, kio estis nepra bezono antaŭ la partopreno en UK. Mi estas ege kontenta, ke neniu el la grupo havis gravajn sanproblemojn kaj la tuta vojaĝo pasis sen iu ajn serioza akcidento.

Espereble, la EK-anoj gardos porlonge en la memoro belegajn vidindaĵojn de Sankt-Peterburgo kaj la metroon de Moskvo, balanciĝadon de la trajno dum veturado en komfortaj vagonoj, la purecon de la Bajkal-lago kaj la guston de «omulj»-fiŝo, varmegon de rusa bano kaj vastaĵojn de Rusio, la lastan sunan tagon en la malproksima Vladivostoko, ĉarmajn koncertojn de profesiaj kaj amatoraj artistoj, amikan akcepton de rusiaj esperantistoj… kaj multon alian, supozeble kaj iom ĉagrene, ankaŭ pluvajn kaj nekutime malvarmajn somerajn tagojn. Eble, iam iu eksopiros pri simila vojaĝo, ĉu denove tra Rusio (?), ĉu tra alia lando en iu alia parto de la mondo... Tamen mi bone komprenas, ke similajn vojaĝojn kiel tiu per Transsib oni faras kutime unu fojon en la vivo: ne ĉiu kuraĝos ripeti tiom longdistancan vojon... Sed, kiu scias... La tria karavano, sed ne la lasta...

Kaj fine. Memkompreneble, ke tiu ĉi vojaĝo ne povus okazi sen subteno kaj helpo de REU, ĝia prezidantino S. Smetanina kaj estrarano M. Ĉertilov, multaj surlokaj esperantistoj ne nur en Moskvo, sed ankaŭ en SPb kaj Vladivostoko. Ili plenanime akceptis kaj akompanis niajn eksterlandajn gastojn laŭlonge de nia itinero. Koran kaj sinceran dankon al ĉiuj!

Tatjana Loskutova (Ivanovo)

POŜEĤONJE – BJELOVAR: PARTO DE LA ESPERANTO-SOMERO

Antaŭ tridek jaroj, aĉetinte mian unuan aŭton, mi ege ŝatis longdistancajn vojaĝojn. Mi ŝatus ankaŭ nun, sed la sanstato metas certajn limigojn en mian konduton. Pro tio mi daŭre meditis, akceptante decidon pri vojaĝo al ĉi-jara RET per aŭto. Tamen, konvinkiĝinte, ke tio estas ununura ebleco almenaŭ dum du tagoj restadi inter ŝatataj geamikoj, mi sidigis en la aŭton du peterburganojn, Valeria Cvetkova kaj Aleksandr Osokin, entreprenis iron al la urbo Poŝeĥonje, Jaroslavla gubernio, kaj kun ĝuo konkeris la 450-kilometran vojon per 5,5-hora stirado. Kaj eĉ sekundon mi ne bedaŭris pri la decido, respondante la demandon, ĉu plaĉis al mi la aranĝo, en pure rusa dialekto de Esperanto: "Ankoraŭ kiel!".

Ĉar evidentiĝis, ke "Ĉudnoj dvor", la bazejo de RET, estas loko efektive mirakla kaj mirinda. Ĉar antaŭ alveno de la plejmulto, la 1-an de aŭgusto mi havis plezuron renkonti kelkajn bonajn homojn, kundrinki kaj, profitante ankoraŭan ne RET-an tempon, prezenti miajn ruslingvajn kantojn kaj versaĵojn. Ĉar duonon de la sekva tago, la tempon de alveno kaj enloĝiĝo de la RET-anoj, ni, la fruvenintoj, uzis por gapi promene al la ĉarma kaj naive provinceca urbeto Poŝeĥonje, kie la altstatura Lenin varme salutas imponan preĝejon, kie pitoreske fluas bela rivero, kie en la sama ejo najbaras (se oni kredu la ŝildojn) modsalono kaj funebraĵ-vendejo... Finfine, ĉar dum la du unuaj tagoj de RET mi sukcesis naĝi en la rivero, ĝissate babili kun bonaj amikoj-amikinoj, prezenti du prelegojn, koncerton kaj ĉeesti kun ega plezuro la provkantadon de "Ekvinokso"! Bedaŭrinde, ne la koncerton mem, ĉar jam la 3-an de aŭgusto, frumatene mi devis ekiri la revenan vojon.

Do jes, ĉar la 5-an frumatene startis mia flugo al Zagrebo, kaj, havante nerepageblan flugbileton en la poŝo, mi devis okupi mian lokon en la avio. Tiel el la 15-grada pluveto de Pulkovo post kelkhora flugo mi trafis en la 36-gradan ŝvitejon – Kroation.

La festivalo Inter-Fest, organizata de Bjelovara Esperanto-societo, estas konsiderinde nova aranĝo sur la abunde loĝigita mapo de la ĉiujara Esperanto-lando. Pro tio min, la unuafojan kaj ununuran partopreninton el Rusio, mirigis kaj la loka aŭtoritateco de la aranĝo, kaj la impona organizo, kaj la partoprenantaro, kaj la riĉa programo. Pri ĉio do mi kurte raportu.

Certe, aranĝo kun pli ol 100 partoprenantoj por la urbeto kun tridek mil loĝantoj estas rimarkinda evento. Sed antaŭe mi vidis urbestron mem saluti solenan malfermon de esperantista kunveno nur en 2004, en mia Tiĥvin. Ĉi tie, en Bjelovar, la urbestro ne nur salutis, sed restis kun la festivalanoj dum la tuta interkona vespero, videble ĝuante la varian programon. Ankaŭ ĉiuj lokaj kaj regionaj amaskomunikiloj entuziasme raportadis pri la evento, prezentante multajn fotojn, intervjuojn kaj impresojn, kiuj estis nur pozitivaj. Rezulte la loĝantaro, bone informita, kun scivolo gapis al ĉiu portanto de la festivala ŝildeto kaj amase venadis al la publikaj programeroj.

Mi senhezite atestas, ke dum la meso en Esperanto kaj poste, dum la koncerto de ekleziaj kantoj, prezentita far la zagreba operkantisto Neven Mrzleĉki, la katedralo de Sankta Tereza de Avila estis plenplena. Ke mankis liberaj seĝoj en la centra placo, kiam en la belege lumigita laŭbo ni (la violonistoj Francoise kaj Dede, la operkantisto Neven kaj mi) koncertis por la publiko, samkiel mankis tiuj dum la Nacia vespero "Bjelovar per koro kantas". Ke amase vizitataj de la urbanoj estis ankaŭ la tri (!) ekspozicioj, okazintaj enkadre de la festivalo: de infandesegnaĵoj – kun premioj por la venkintoj, de diverslandaj abocoj kaj de la bonega korea pentristo HO Song. Cetere, la lasta aranĝis ankaŭ publikan lecionon pri pentroarto, kiun plezure partoprenis la urba junularo.

Kaj apartaj programeroj por la esperantistoj! Ili estis aparte elstaraj kaj allogaj. Novajn librojn prezentis la verkistoj Tomasz Chmielik kaj Lidia Ligenza (Pollando), Georgi Miĥalkov (Bulgario), Josip Pleadin kaj Zdravko Seleŝ (Kroatio), kaj mi, sed la plej furora estis prezento de la plej granda libro – kvarkilograma oklingva medicina enciklopedia vortaro de d-ro Jozo Mareviĉ. Entuziasme aplaŭdataj estis la individuaj unuhoraj koncertoj de ĉiuj artistoj, kiuj antaŭe prezentis sin al la urbanoj, ĉe tio la koncerton de Neven brile partoprenis ankaŭ la juna violonĉelistino Blanka. Plezure ni spektis en la urba kinejo filmon "Esperanto" de Dominique Gautier. Allogis atenton la ronda tablo pri la festivala temo "Kultura kunfandiĝo de la multetna Eŭropo" kaj la deklamkonkurso kun aktiva partopreno de la juna generacio. Mi kun ĝuo partoprenis en la kurseto pri la kroata lingvo de la profesorino Maria Jerkoviĉ por nepre enkapigi, ke "Mi amas vin" en la kroata sonas "Volim tebe".

Kaj fine – la ekskursoj! Al la kultura centro kun la nomo de brila porinfana

verkisto Mato Lovrak, kies du romanoj aperis ankaŭ en Esperanto. Al la impona ĉefurbo Zagrebo – kun nepra mencio pri Nikolao Hohlov, kiu longtempe loĝis tie. Al la naskiĝloko de Tito, al belegaj kasteloj, monumentoj, tombejoj kaj eĉ al la kvarcentjara tilio, kiu havas apartan valoron por la kroatoj. Plena kapo da impresoj por mi, preskaŭ nenion vidinta dum miaj du antaŭaj prelegadoj en Kroatio!

Por eventualaj vojaĝemuloj mi povas diri krome, ke ĉe la kurzo de kunao (loka monunuo) facile kalkulebla (10 rubloj) mi trovis, ke la prezoj en Kroatio estas tute moderaj por Eŭrop-Unia ŝtato, jen kaj jen eĉ malpli altaj ol en Rusio – kaj por loĝado, kaj por nutraĵoj, kaj (hura!) por lokaj bongustaj bieroj.

Ĝi estis mia lasta vojaĝo por tiu ĉi somero, kaj mi dankoplene klinas mian kapon antaŭ la organizantoj de Inter-Fest, kiu okupis laŭmerite dignan lokon en la listo de Esperanto-kunvenoj, kaj kiu, espereble, vekos atenton de la rusiaj esperantistoj dum sekvaj jaroj.

Mikaelo Bronŝtejn (Tiĥvin)

Antaŭ RET-2017

muziko de Mikaelo Povorin, teksto de Klara Ilutoviĉ

Nin invitas, nin atendas nova RET,
Nin alvokas, nin allogas ĝia vort'.
Esperige bolas vervo kaj impet',
Pliviglige kantas juniĝinta fort'.
Nin renkontos riverlud' kaj freŝa vent',
Verda ĝojo de fekunde riĉa ter',
Nin brakumos amikec' de l' nova sent',
Kora lumo de la lingva atmosfer'.
Ni baniĝos en la hela lingvomar',
En impresoj pri la nova landopart',
En kuniĝa bril' de esperantistar',
En etoso, pleniganta je viv-ard'.

Vidindaĵoj, favorem' de la natur',
Per prelegoj kaj kantado
temp-ornam'!..
Venu, fluu kaj torentu RET-plezur',
Korojn regu bonvolemo kaj
viv-am'!

Ni pasigu ĝojan tempon en la RET,
En somero, kiu baldaŭ velkos for.
Je l' fidela kaj fidinda helpopret'
Pri la Tagoj lumu varma rememor'!



BULTENO de REU

apartaj materialoj el la septembra kaj oktobra numeroj

RET-2017
EN LA LOKO NE ENSORĈITA, SED ĈARMA

Ĉi-jare RET okazis inter la 2-a kaj 9-a de aŭgusto en la urbeto Poŝeĥonjo en Jaroslavla provinco. Partoprenis ĝin 62 personoj. La elekto de la loko estis ne hazarda – la aranĝo estis dediĉita al 140-jariĝo de Ivan Ŝirjaev, Esperanto-verkisto, tradukisto kaj iniciatinto-ĉefredaktoro de Enciklopedio de Esperanto. Li estis dum preskaŭ 30 jaroj vilaĝa pastro, kaj la prej proksima urbo de lia iama paroĥo estas ĝuste Poŝeĥonjo.

Honore al I. Ŝirjaev okazis Lego-tago kun prelegoj pri lia vivo, kreado, naskiĝloko kaj familio. Oni eksciis novajn faktojn; aparte impresa estis la ruslingva rakonto de Galina Burŝa – eksa direktorino de, bedaŭrinde, ne plu ekzistanta popola muzeo de la naskiĝvilaĝo de Ŝirjaev Vereteja. Krome, okazis ekskurso al lia iama loĝ- kaj servoloko Zinovjevo. La vilaĝo ne plu ekzistas – nun tie estas arbaro, la preĝejo estas forlasita kaj duonruinigita, kaj ne atingeblas per aŭtoj. Tial la lastajn 6 kilometrojn post fino de asfalto oni veturis tien tra terura koto per ĉaretoj, kiujn tiris traktoroj. En la restaĵoj de la preĝejo okazis liturgio honore al memoro de I. Ŝirjaev, kiun ĉeestis kaj esperantistoj, kaj kelkaj loĝantoj de proksimaj lokoj; gvidis ĉion kelkaj pastroj el la Ribinska eparĥio, inter ili mem episkopo de Ribinsko Benjameno. Li private konfesis, ke neniam tian travivaĵon ĝis nun spertis. La samon diris la partoprenintino el Kubo Alina Dolores Zuaznabal Himely. Necesas emfazi, ke ĉion tion iniciatis kaj aranĝis arda esperantisto kaj esploristo de la vivo de Ivan Ŝirjaev pastro-monaĥo Taŭriono (Ilja) Smikov el Sergijev Posad.

Krom la Lego-tago, okazis sufiĉe enhavriĉa somera universitato kun la ĉeftemo "Idea, filozofia kaj religia fono de Esperanto". Pri tiu temo prelegis Andreo Obrezkov, Nikolao Gudskov kaj Gennadij Basov. Pri aliaj diversaj temoj prelegis Mikaelo Bronŝtejn, Anna Striganova, Dmitrij Ŝevĉenko, Vladimir Opletajev k.a., troviĝis loko ankaŭ al eksterprogramaj prelegoj, ekz. de A. Zuaznabal Himely pri la kuba Movado.

Altan nivelon havis diversnivelaj kursoj (elementa – de Mikaelo Ĉertilov, kaj brila konversa rondo de Irina Gonĉarova), ludoj, konkursoj… Varia estis la koncerta programo (M. Bronŝtejn, M. Povorin, ensemblo "Ekvinokso" en konsisto: A. Obrezkov, V. Vorobjov kaj E. Sokolova, aŭtora prezento de diversflanka kreado de Ludmila No-

vikova). Pro la ne tro varma vetero ĉiuj aranĝoj estis aktive partoprenataj, do prelegantoj kaj aliaj aranĝgvidantoj ne plendis pro manko de atento flanke de la publiko.

Al ĝenerala kontento de la partoprenintoj necesas aldoni plezuron pro la loko – Poŝeĥonjo ja estis dum jarcentoj kaj plu restas iu certa modelo de profunda rusa provinco (kvankam reale facile atingeblas de grandaj urboj). Tiu aŭtentika provinceco de ĉirkaŭaĵo aldonis apartan ĉarmon al la aranĝo, kion suplementis dum- kaj postaranĝaj ekskursoj al la urbo; al la vilaĝo Kukobojo (survoje al Zinovjevo), kiu estas proklamita naskiĝloko de Avino Jaga; al fama Romanov-Borisoglebsk (Tutaev) – kie la ĉefpastro de la katedralo permesis al esperantistoj trejniĝi pri sonorigado sur la turo; al la plej bela, almenaŭ laŭ reklamo, vilaĝo de Rusio Vjatskoje; kaj al la vere admirindaj urboj Jaroslavlo kaj Kostromao.

Nu, kaj nepre menciindas la grava movada signifo de la aranĝo – ja kadre de ĝi okazis 29-a Konferenco de Rusia Esperantista Unio (32 registritaj delegitoj), kiu provis pritaksi la ireblajn vojojn por evoluo de la organizo. La Konferenco elektis la 7-kapan Estraron gvide de la denove elektita Prezidanto Svetlana Smetanina.

Nikolao Gudskov

Decidoj de la 29-a Konferenco de REU

okazinta en la urbo Poŝeĥonjo (Jaroslavla provinco) 06-07.08.2017
(partoprenis 32 registritaj delegitoj)

La elektitaj gvidorganoj:

La Estraro:
Svetlana Smetanina – prezidanto
Nikolaj Gudskov – vicprezidanto
Mikaelo Ĉertilov
Irina Gonĉarova
Aleksandr Lebedev
Aleksandr Mitin
Vladimir Opletajev

La kontrol-revizia komisiono:
Gennadij Basov – kunordiganto
Valentin Seguru
Aleksandr Milner

Komisiito pri dokumentaro – Viktor Aroloviĉ

La konferenco decidis:

1. Laŭdi la agadon de MEA MASI en la raporta periodo kaj rekomendi al la kluboj-membroj de REU studi kaj sekvi la spertojn de MEA MASI.

2. Apogi Esperanto-ekzamenon en Rusio.
3. Okazigi en la jaro 2019 internacian aranĝon en Rusio: antaŭ- aŭ postkongreson de UK kaj (eble, en 2020) SES-Rusio-2.
4. Apogi okazigon de Aktivula Maturigo en Rusio.
5. Daŭrigi la agadon pri eternigo de memoro de Ludoviko Zamenhof en Moskvo kaj aliaj urboj okaze de Zamenhof-jaro.
6. Krei fonduson pri subteno de laboro pri la vortaro de B. Kondratjev.
7. Subteni informe la laboron de J. Kikavec pri internacia tradukado pere de Esperanto.
8. Esplori eblecojn pri okazigo de RET-2018 en teritorio de Rusio. La limdato por proponoj estas la 1-a de oktobro.

Impresoj pri RET-2017

Antaŭ kelkaj tagoj nia kvinkapa urala esperantista grupeto revenis hejmen post la vojaĝo al Jaroslavla provinco kaj partopreno tie, en Poŝeĥonjo, en la Rusiaj Esperanto-Tagoj-2017. Dum pluraj monatoj de la jaro ni atendis RET-on kaj revis pri ĝi kaj jen nun niaj revoj transformiĝis jam en la rememorojn. Sed por mi estas plezuro eĉ nur rememori tiun ĉi tempon.

Ĉiu vojaĝo similas al nova, ankoraŭ ne tralegita libro. Komence vi scias nur ĝian titolon kaj aŭtoron, sed poste ĉiu tago de la vojaĝo iĝas realaĵo kaj similas al la nova ĉapitro de la libro. Same kiel libroĉapitroj, la tagoj estas diversaj: longaj kaj pli kurtaj, eventoplenaj kaj ne tre, kaj foje tiom atentokaptaj, ke vi ne volas, ke la tago finiĝu, same kiel oni ne volas, ke finiĝu la libroĉapitro kaj oni volas daŭrigi la legadon.

Komenco de la vojaĝo kaj la unua tago de RET 2017

La vojaĝo komenciĝis tre agrable, kiam nia kvaropo (Pavel Veselov el Tjumeno, Vladimir Opletajev el Surguto, Lena Uspenskaja kaj mi el Jekaterinburgo) renkontiĝis en la trajnvagono, kie nin rapide forlasis la grizeco de la rutina vivo, cedinte lokon al ĝoja amika kunestado, senĉesaj interparoloj pri diversaĵoj, kun teumado kaj antaŭĝuo de la evento. Ni ne rimarkis, kiel rapide pasis la vojo-tempo, kaj ni jam atingis la turisman bazejon “Strangula korto”, kie devis okazi RET-2017.

Beleco de la loko kaj naturo estis memvalora, ĝi kaptis nin de la unuaj tagoj kaj ne forlasis ĝis la fino. La tuta pejzaĝo estis paca, milda, ĝi donacis animan kvieton kaj percepton de la harmonio. La mondo, plena de freŝa aero, lumo kaj akvomoviĝo! Eblis ekhalti kaj silente observi la sunleviĝon aŭ la mirindan sunsubiron! En la korto staris granda kelketaĝa ligna domo, kiu servis kiel

hotelo por loĝado en komfortaj kondiĉoj, pluraj unuetaĝaj lignaj dometoj, manĝejo kaj kelkaj laŭboj. La tuta korto estis riĉe ornamita per multaj lignaj skulptaĵoj (de herooj de tre konataj fabloj kaj fabeloj), kiuj gardis la trankvilecon de la korto kaj kiujn ĉiam estis agrable tuŝi kaj karesi dum la promenadoj. Sufiĉis nur transiri la korton por veni al la bordo de la akvorezervejo, en kiu multaj el ni naĝis matene kaj en alia libera tempo de la tagoj. La aero, verdaĵoj, aromoj, akvujo vekis admiron, oni volis kanti kaj en la memoro aperis poeziaj linioj. Mi kelkfoje citis al la geamikoj tre konvenan strofon el la poemo de M. Giŝpling:

"La milda sun', kaj la karesa vento
Kaj la profunda, diafana blu'…
Ho, kia bel'! Ne pasu la momento –
Ĝi daŭru plu,
Ĝi ĉiam daŭru plu!"

La bunta mozaiko de la programo de tiuj ĉi tagoj estis kunmetita el diversaj programeroj. Post la sinprezento de la partoprenintoj, interkonatiĝo kaj apartaj anoncoj de la respondeculoj pri la programeroj, en la unua vespero okazis la koncerto de nia ŝatata bardo Mikaelo Bronŝtejn, kiu povis viziti la renkontiĝon nur por du tagoj, ĉar li devis forveturi eksterlanden por partopreni internacian Esperanto-aranĝon. Ni ĝuis novajn kaj multajn malnovajn kantojn en la plenumo de Mikaelo, ofte kunkantis, kaj agrabla, amika etoso de la vespero bonege unuigis ĉiujn ĉeestintojn. Fine de la vespero estis komuna festado de la 25-jara jubileo de la eldonejo "Impeto", kiam sonis voĉigitaj rememoroj pri la krea vojo de ĝiaj eldonistoj, amikaj tostoj kaj estis aranĝita vendoekspozicio de libroj de "Impeto". Dum la lasta mi akiris kelkajn novajn Esperanto-librojn por mia biblioteko, la novan diskon de Mikaelo Bronŝtejn kaj Sergeo Straŝnenko kaj donace ricevis la antaŭnelonge eldonitan romanon de Mikaelo Bronŝtejn "Mi stelojn jungis al revado", kaj tuj povis peti la aŭtografon de la aŭtoro.

Legado omaĝe al la 140-jara jubileo de I. Ŝirajev

Dum la dua tago de RET tage mi vizitis unu el prelegoj de la Somera universitato. Ĉiuj prelegoj estis vere interesaj, sed mi mem povis ĉeesti entute nur kvar (tial pli bone iu alia prilumu tiun programeron). Krome mi partoprenis KoRo-n (Konversacian rondon), kiun gvidis Irina Gonĉarova, ĉar mi scivolis pri formoj kaj iloj, kiujn ŝi uzas por paroligi esperantistojn-novulojn. Sed plej multe impresis min tiu tago de la aranĝo, kiu nomiĝis "Legado omaĝe al la 140-jara jubileo de Ivan Ŝirjaev". Dum ĝi okazis prelego pri Ivan Ŝirjaev fare de pastro-monaĥo Taŭriono (Ilija Smikov) el Moskva eklezia seminario. Ŝirjaev estis elstara esperantisto de la 20-30 jaroj de la pasinta jarcento, verkisto kaj tradukisto (kiu tradukis en Esperanton verkojn de F.M. Dostojevskij kaj L.N. Tolstoj), iniciatinto-ĉefredaktoro de la Enciklopedio de Esperanto. Multaj verkoj de la verkisto estis publikigitaj dum lia vivo en diversaj Esperanto-revuoj kaj kelkaj ricevis literaturajn premiojn, sed manuskripto de la ĉefa verko de I. Ŝirajev – romano "Sen titolo" – longe kuŝis en Esperanto-muzeo de Vieno kaj estis publikigita nur en 1995. La pastro Johano naskiĝis en Poŝehonjo, en la vilaĝo Vereteja kaj de 1905 diservis en la preĝejo de Zinovjevo. Li ko-

natiĝis kun Esperanto en 1895, dum sia studado en Jaroslavla eklezia seminario kaj dum la tuta vivo restis fidela adepto de la lingvo.
Dum la aranĝo ruslingve prelegis ankaŭ regionesploristo Galina Burŝa el la vilaĝo Vereteja, kiu rakontis pri la naskiĝloko de I. Ŝirjaev. Krome Maksim Soloĥin prezentis la biografion de la pastro kaj Nikolaj Gudskov voĉlegis la publikigitan studaĵon de Sten Johansson pri la verkaro de I. Ŝirjaev.
Mi devas diri, ke min tre impresis la personeco de Ivan Ŝirjaev, historio de lia vivo, kaj krome mi rememoris, ke dum la eldonado de "Komencanto", en ĝia rubriko pri la historio de la Esperanta literaturo, ni publikigis la materialon pri Esperanto-verkisto-klasikulo Ivan Ŝirjaev kaj prezentis fragmenton el unu el liaj verkoj. Ĉu mi povus imagi tiam, ke pasos dekoj da jaroj kaj mi vizitos lokojn, ligitajn kun li kaj eĉ ĉeestos la liturgion, dediĉitan al li! Jen per kio estas valora RET-2017!
Vespere de tiu tago okazis ankoraŭ unu bona koncerto de la aŭtora kanto de moskvano Mikaelo Povorin, sonis liaj jam konataj por mi kaj ankaŭ multaj aŭdindaj novaj kantoj. Tiel agrable finiĝis la dua tago de RET.

Ekskurso tra Poŝeĥonje. Mirinda vespera koncerto de "Ekvinokso"
En la kvara tago de RET, tuj post la matenmanĝo, ekis piedpaŝa marŝo al Poŝeĥonjo kaj duontaga ekskurso tra la urbo. La urbeto situis ne tiom fore de la bazejo "Strangula korto", la vojo ne estis enua kaj nia multopa grupo promenis tre volonte.
Ankoraŭ vintre, kiam mi eksciis, ke RET-2017 okazos en Poŝeĥonjo, mi certe rememoris la titolon de la verko de Saltikov-Ŝĉedrin "Poŝeĥonskaja starina" ("Poŝeĥonja antikveco"), kaj en mia imago aperis neurbaj pejzaĝoj, unuetaĝaj domoj sur ne tre vastaj stratoj, vilaĝa preĝejo, lageto, nehasta biena vivo…
Reale Poŝeĥonjo estis malnova, trankvila, sufiĉe pura kaj taŭga por la vivo negranda urbeto, kun nur 6 miloj da loĝantoj. Antaŭe la loko sur la rivero Ŝeksno (la malnova nomo Ŝeĥonj) nomiĝis Poŝeĥonje kaj apartenis al Jaroslavla princlando ĝis la jaro 1341. En la 17-a jarcento surloke de la nuna urbo troviĝis la vilaĝo Pertomka (pro la samnoma rivero). En 1777 Katerina la Granda per sia ukazo alinomis la vilaĝon en la urbon Poŝeĥonjo. Nun oni nomas ĝin la "urbo de kvin riveroj kaj sep pontoj" kaj ŝercas, ke tiun kvanton por ĉiu kapo havas nek Venecio, nek Peterburgo aŭ Hamburgo. La nuna Poŝeĥonjo havas du templojn: la Triunuan katedralon sur la urba placo kaj la Asumpcian preĝejon ĉe la tombejo. Mem la urba placo de Libero havas duonrondan formon, kiu per la formo de la "malfaldita ventumilo" de stratoj determinas la tutan urboplanon. Sur la placo estas komercaj vendejaj vicoj, tiom karakteraj por la mezrusiaj provincoj. Malantaŭ la katedralo estas negranda parko kun la memorejo de herooj. Ni iris al la blankŝtona preĝejo de la katedralo, kun la smeraldkoloraj kupoloj kaj sonorilejo. Ĉiuj dezirantoj eĉ povis ascendi ĝin kaj provi kariljoni desupre. Poste ni iom promenis tra la urbocentro, observante festan etoson, kiu regis tie (la urbo festis sian 240-jariĝon). Ni ankaŭ vizitis regionografian muzeon, kie ĉiĉeronino rakontis al ni pri la historio de la urbeto kaj ĝiaj metioj, kie ni ankaŭ eksciis pri la aŭtoro de la fama recepto de poŝeĥonja fromaĝo G.A. Kamenskaja. Post la muzeo ekskurso daŭris jam sur la urbaj stratoj. Tiumomente mi kun du amikoj decidis reveni al la bazejo, ĉar ni sukcesis viziti kaj iom vidi la urbon en la antaŭa tago. Ni jam vigle paŝis laŭ la ponto trans la riveron Pertomka, kiam komenciĝis ŝtormo kaj pluvego, de kiu nin ne povis savi eĉ niaj ombreloj kaj anorakoj. La lastan distancon ĝis la "Strangula korto" ni vete kuregis, sed revenis al la bazejo plene malsekaj. Nature, post la duonhoro tiu somera

pluvego finiĝis kaj denove ekbrilis la suno. Ŝanĝinte la vestojn kaj trinkante varmegan teon, ni jam kun ridetoj plezure rememoris nian mallongan aventuron.
Vespere de tiu tago okazis koncerto de la muzikgrupo "Ekvinokso" en la konsisto: Andrej Obrezkov kaj Valerij Vorobjov el Ivanovo kaj Evelina Sokolova el Krasnojarsko. Tio estis vere impresa kanta-muzika mirteatraĵo, kiu ricevis meritan atenton de la publiko. Muzikistoj kaj kantistoj de la grupo, ĉiu kun sia fascino, talento kaj temperamento, tre harmonie kaj amikeme kunekzistis sur la scenejo kiel unueca organismo, donacante al la aŭskultanta publiko multe da pozitivaj emocioj. Muziko kapablas efiki sur iujn animsensilojn kaj krei tute apartan, neforgeseblan humoron! Post tiu ĉi koncerto multaj sentis emocian entuziasmon kaj estis forte impresitaj.

REU-Konferenco. Lignofajro. Aŭtora vespero de Ludmila Novikova
Dum la sekvaj du tagoj de RET, la kvina kaj sesa, ĝis la tagmezo daŭris la planita Konferenco de REU. Ĝi pasis sufiĉe paceme, sen iuj komplikaĵoj, kun la kutima tradicia tagordo. Estis raportoj de REU-prezidanto, de apartaj estraranoj kaj ankaŭ de klubgvidantoj aŭ klubaj reprezentantoj. Ĉar mi konstante interesiĝas pri la stato de la Esperanto-movado en Rusio kaj kaptas ĉiujn novaĵojn pri ĝi, ne estis io nova kaj neatendita por mi. Dum la reelektoj estis du kandidatoj por la posteno de REU-prezidanto (Svetlana Smetanina kaj Mikaelo Ĉertilov) kaj estis denove reelektita kiel prezidanto Svetlana. Freŝecon al la momento aldonis elekto en la Estraron de nia uralano Vladimir Opletajev, kiu elektiĝis la unuan fojon, ĉiuj ceteraj estraranoj jam ne estis novuloj tie. Kompreneble, min ĝojigas tiu fakto, ke Vladimir iĝis REU-estrarano, kaj mi deziras al li sukcesan kaj fruktodonan laboron en la kampo de instruado en REU. Krome dezirindus, ke ni, samregionanoj, subtenu nian amikon kaj kiom eble helpu al li!
Vespere de tiuj du tagoj okazis bonegaj kaj memorindaj programeroj. Unu el ili estis lignofajro ĉeborde de la akvorezervejo. Mi ŝatus danki la prizorgantojn de la lignofajro, kiuj donacis al ni tiun nostalgiplenan vesperon! Iam lignofajroj estis konstanta elemento de SEJT-oj. Mi ĝis nun memoras la lignofajrojn, kiuj ĉiuvespere okazis dum OkSEJT en Jurmala ĉeborde de Balta maro! Ankaŭ ĉi-foje ni plezure sidis "en amika rond'", kunkantis komunajn kantojn akompane de la gitaro de Mikaelo Povorin kaj de la akordiono de Vladimir Solovjov. La fajro brulis jen pli forte, jen malpli, ankaŭ niaj voĉoj sonis pli aŭ malpli laŭte. Ni ankaŭ ĝue observis la belan sunsubiron, la ŝanĝon de ĉielkoloroj kaj luman vojeton sur la akva surfaco. Laŭronde ni gustumis la regalaĵon el Kubo – bonodoran kaj fortan rumon, kiun alportis gasto de RET, kuba esperantistino Alina Dolores Zuaznabal Himely. Estis vere romantike, tre animece kaj varmece en ĉiuj sencoj! Tiunokte longe maleblis endormiĝi, ja en la kapo plu sonis la rememoritaj kantoj.

"Aparta kanto" estis la sekvonttaga programero – aŭtora vespero de nia poetino Ludmila Novikova, eksa uralanino, kiu nun loĝas en Moskvo. Ludmila mem voĉlegis la proprajn tradukojn de rusiaj klasikuloj, siajn originalaĵojn kaj ankaŭ kolektis la geamikojn, kiuj tre emocie kaj bele prezentis ŝiajn poemtradukojn. Inter la deklamantoj tiuvepere estis du uralanoj: V. Opletajev, voĉleginta la tradukitan de Ludmila poemon de A. Blok "Rusio" kaj mi, prezentinta la poemon de A.S. Puŝkin "La Baĥĉisaraja fontano". Tio es-

tis belega eblo mergiĝi en la krean mondon de Ludmila! Ankaŭ muziko, fratino de poezio, akompanis poeziajn verkojn en tiu ĉi vespero. Komponitaj de Mikaelo Povorin kantoj al la versaĵoj de M. Cvetajeva kaj K. Balmont en la traduko de Ludmila sonis, tre profunde penetrante en la animon. Ankaŭ "Ekvinokso" bele kantis kelkajn tre konatajn kaj malnovajn kantojn je vortoj de Ludmila, inter ili tre plaĉan al mi "Orienton". Por mi, poeziŝatanto, ankaŭ tiu ĉi vespero iĝis vere neforgesebla!

Raja Kudrjavceva

Prelegaro de RET-2017

La programo de la Rusiaj Esperanto-Tagoj-2017 ofertis multon klerigan, kio konsistigis la abundan prelegserion de la Somera universitato, dokte gvidata de Nikolaj Gudskov, kaj plurajn duskutrondojn. Ne ĉiuj prelegoj estis ligitaj kun Esperanto, sed ĉiuj temoj senescepte estis interesaj, provokis multajn demandojn de la aŭskultantoj kaj diskutojn.

Mi klopodis ĉeesti ĉiujn prelegojn, sed bedaŭrinde pro la samtempe okazigataj programeroj miaj penoj ne tute realiĝis, kaj en ĉi tiu mesaĝo mi mencios nur prelegojn, kiujn mi aŭskultis. Tiu ĉi preleglisto ne respegulas do la tutan temaron.

Mikaelo Bronŝtejn – "Tiĥvino kaj ĝiaj sanktejoj". Mikaelo estas sperta oratoro, li prezentis tre interesan historion de la Sankta Tiĥvina ikono de Dipatrino.

Mikaelo Bronŝtejn – "Sonato pri entreprenado". Li rakontis pri faktoj pri la uzado de Esperanto en la entreprenado: komerco, turismo, komerca varbado ktp., kaj pri propraj spertoj kaj provoj starigi komercajn ligojn per Esperanto.

Nikolaj Gudskov – "Zamenhof kiel reprezentanto de la "rusa kosmismo"". Filozofiaj aspektoj de la idearo de L. Zamenhof kiel parto de la "rusa kosmismo".

Pastro Taŭriono (Ilija Smikov) – "Ivan Ŝirjaev. Vivo kaj verkaro". Detala raporto pri la vivo, pastra servado kaj Esperanta verkaro de la ortodoksa pastro Ivan Ŝirjaev enkadre de la "Legotago omaĝe al la 140-jara jubileo de I. Ŝirjaev".

Aleksandr Osokin – "Pri la vortaroj de Boris Kondratjev".

Anna Striganova – "Lingvo de fabeloj, aŭ samaj motivoj en fabeloj de diversaj landoj".

Anna Striganova – "Baba Jaga el la scienca vidpunkto".

Anna Striganova – "Dronintaj urboj: realaj kaj fabelaj". Anna profunde studas folkloran temaron de fabeloj kaj mem verkas fabelojn en Esperanto.

Gennadij Basov – "Lidija Zamenhof – vivo kaj agado; ŝiaj samideanoj". Rakonto pri la vivo de la filino de L. Zamenhof, ŝia poresperanta agado kaj aktivado en la religia movado de bahaistoj, ŝia tragika pereo en la faŝista koncentrejo.

Dmitrij Ŝevĉenko – "Elektronikaj libroj en Esperanto".

Dmitrij Ŝevĉenko – "Distancaj kaj korespondaj kursoj de Esperanto". Ambaŭ prelegoj de la redaktoro de la revuo "Esperanto" argumentite prezentas tre interesajn spertojn, aktualajn faktojn kaj analizojn.

Vladimir Opletajev – "Lingvoprotektado en Ĥanta-Mansa aŭtonoma distrikto – Ugrujo". Problemoj kaj devioj en la protektado de la minoritataj ĥanta kaj mansa lingvoj en la aŭtonoma distrikto.

Vladimir Opletajev

La turisma programo de RET

La turisma programo de RET-2017 kaj la post-RET-a vojaĝo sendube plaĉis al ĉiuj partoprenintoj, ĉar ni trafis la lokojn kaj urbojn, kiuj estis grava historia scenejo en la mezepoka Rusio kaj kiuj nun apartenas al la urboj de la Ora ringo.

Poŝeĥonjo (1777), kiu gastigis RET-on en la fabela bazejo "Strangula korto", estas ĉarma rusa provinca urbeto, situanta surborde de Ribinska akvorezervejo kaj vivanta sian nehastan trankvilan vivon, inter la Lenin-monumento kaj la ĉefpreĝejo de Triunuo.

La 8-an de aŭgusto multaj RET-anoj partoprenis la tuttagan ekskursan vojaĝon al la urboj Ribinsko kaj Tutajevo (Romanov-Borisoglebsk). Ribinsko estas la dua granda urbo de Jaroslavla provinco, ĝia grava komerca kaj industria centro. En la 30-aj jaroj de la pasinta jarcento ĉi tie estis konstruita hidroelektrocentralo kaj kreita vasta akvorezervejo. Dum la ekskurso ni povis ĝui la belan historian centron de la urbo kun la Savanto-Transfiguriĝa katedralo, vizitis la muzeon de la subakvigita urbo Mologa.

Transveturinte Volgon per pramŝipo, ni atingis la urbeton Tutajevo (1777). La urbo ricevis sian revoluciulan nomon en 1918, sed antaŭe tio estis du memstaraj malnovaj urbetoj Romanov kaj Borisoglebsk. Tutajevo estas la 12-a urbo, apartenanta al la Ora ringo (entute 12 urboj), posedas plurajn preĝejojn, inter kiuj elstaras Kazana preĝejo kaj Resurekta katedralo, sed ĝi bezonas urĝan restaŭradon de siaj historiaĵoj.

La 4-an de aŭgusto post la Sankta liturgio en la vilaĝo Zinovjevo, kie diservis pastro Ivan Ŝirjaev, okazis vizito al la vilaĝo kun la kurioza nomo Kukobojo, en kiu nin ĉiujn surprizis per sia beleco la Savanta preĝejo, kaj la vilaĝanoj amuzis nin per folklora spektaklo, en kiu ĉefrolis Baba Jaga.

La 9-an de aŭgusto granda grupo de ekskursemaj RET-partoprenintoj venis en la vilaĝon Vjatskoje (1502) apud Jaroslavlo, promenis tra ĝiaj flegitaj stratoj, vizitis muzeojn, noktumis en luksa hotelo. Vjatskoje estas aligita al la Asocio de la plej belaj vilaĝoj de Rusio ekde 2015.

La tutan tagon de la 10-a de aŭgusto ni pasigis en la bela malnovrusa urbo Jaroslavlo (1071), ĝuis aŭtentan mezepokan atmosferon de la antikva urbo. La tuttagan piedekskurson lerte ĉiĉeronis en Esperanto jaroslavla esperantisto Georgo Kontrov.

Fine ni atingis nian lastan vojaĝcelon – la urbon Kostromao (1152), kiu mirigis ĉiujn per sia belega malnova centro, multaj monumentoj, parkoj, majestaj konstruaĵoj, ĝi posedas ja oficiale la titolon de "historia urbo". Kostromao estas la hejmurbo de Neĝulino.

Vladimir Opletajev

<u>Oni pri ni</u>

Triumfo kaj tragedio. Esperanto kaj Rusia revolucio

La 3-an de aŭgusto en la brita "European studies blog" aperis bonega artikolo "Triumph and Tragedy: Esperanto and the Russian Revolution" (http://blogs.bl.uk/european/2017/08/triumph-and-tragedy-esperanto-and-the-russian-revolution.html). La aŭtoroj estas Moisej Bronŝtejn kaj Renato Corsetti, metis ĝin al la paĝaro Olga Kerzjuk. La artikolo estas ne granda, sed tre bone kompilita kaj riĉe kaj saĝe ilustrita per diversaj kovriloj de libroj pri la koncerna temo. La blogo aperis, kompreneble, okaze de la 100-jariĝo de la Rusa revolucio de la 1917-a.

La eldonejo “Impeto” 25-jariĝis

La eldonejo “Impeto” aperis en 1992 surbaze de la agado pri eldonado de esperantlingvaj libroj fare de granda eldonejo “Progreso”. La nomo estis heredita de la almanako (2 numeroj), kiun eldonis “Progreso” en 1989 kaj 1991. Ĉio okazis dank’ al entuziasmo de elstaraj esperantistoj Aleksandro Ŝevĉenko (13.09.1957-24.11.2012) kaj lia edzino Elena (07.11.1962-05.09.2015). Ili sukcesis organizi plene profesian eldonadon de Esperantaj libroj, da kiuj aperis pli ol 150 (proksimume duono el tiuj, kiuj estis eldonitaj de ili entute). Sen tiu agado la mondo apenaŭ konatiĝus kun verkoj de pluraj aŭtoroj… Estis entreprenitaj grandaj projektoj, kiel, ekzemple, eldono de serio de verkoj de la fratoj Strugackij, serio de sciencpopularaj libroj “Familia biblioteko” ka. Post forpaso de la fondintoj ilian agadon sukcese daŭrigas ilia filo Dmitrij Ŝevĉenko kaj la bofilino Anna Striganova. Okaze de la jubileo estis aparta prezento dum RET-2017 kaj speciala aranĝo – la **10-a Moskva Esperanto-Renkontiĝo (MER-10)** hejme de Dima kaj Anjo, kiun ĉeestis diversaj esperantistoj. Estis riĉa programo kaj varmaj gratuloj (i.a., de la nomo de REU). Ni ĉiuj deziru al la eldonistoj (kiuj ja samtempe estas redaktoroj de la revuo “Esperanto”) pliajn sukcesojn kaj daŭrigon de ilia, tiom necesa por nia komunumo, agado!

Elena kaj Aleksandro Ŝevĉenkoj – la fondintoj de “Impeto”

14.10.17 plenumiĝis 90 jaroj post la naskiĝo de Boris Tokarev (Bonifatio Tornado)

Boris Tokarev estis figuro en la vivo kaj nia movado multflanka. Esperantisto, kiu aliĝis al la lingvo en la unua postmilita (postfestivala) ondo fine de 1950-aj, ekaktivinte en la moskva E-klubo “Fajrero”, li tuj fariĝis arda adepto de la E-kulturo kaj komencis “eldoni” (kompili, tajpi) la beletran (ĉefe poezian) revueton kun la sama titolo “Fajrero” – ŝajnas, ĝi estis la unua samizdata E-eldonaĵo de tiu tempo. Jam ekde la komenco vekiĝis lia krea talento – li tradukis poemojn – el la plej ŝatata lia rusa poeto Lermontov (kies poezion li opiniis pli alta, ol tiu de ĉiuj aliaj poetoj, ankaŭ de Puŝkin), “Eposo pri militiro de Igor”… Kaj konstante aperadis ĉiam pli da liaj originalaj poemoj, kiuj poste konsistigis kolekton “Gutoj falantaj”. Decidinte verki facilan romaneton por komencantoj, kiu estu teksto por lernilo, li forlogiĝis pro la kreata teksto, kaj rezultis ĉarma fantasta romano “Ardes” (*Ardes* estis ankaŭ lia unua literatura pseŭdonimo). Sekvis granda laboro pri epopeo “Vivo de Prometeo”, enhavanta pli ol 10 000 versojn. Krome, li laboris en fabla ĝenro, kaj en kelkaj liaj fabloj oni rekonas pesonojn kaj realaĵojn el la tiama movada vivo. Fine de la 1980-aj jaroj li faris grandan laboron pri traduko de la persa klasika poeto Rudaki.

Cetere, li ĉiam ripetadis, ke li ne estas poeto: poezion verkas “lia amiko” Bonifatio (Bonifatij Vasiljeviĉ) Tornado, por kiu li eĉ elpensis fikcian biografion. Eble tiel estis – kreante, li kvazaŭ transformiĝis je alia persono, kaj tiu nomo estis ne simpla pseŭdonimo, sed nomo de lia *alter ego*.

Ŝatante la Esperantan literaturon, li sukcesis kolekti grandan bibliotekon de esperantlingvaj libroj (li volonte donadis el ĝi librojn por legi) kaj faris seriozajn literaturologiajn esplorojn. Rezultis granda monografio en la rusa (kun esperantlingvaj citaĵoj) "Historio de Esperanta literaturo dum 100 jaroj" – ĝi neniam estis eldonita, tamen ties ĉapitrojn li legis kiel prelegojn en Moskva Centra E-Klubo fine de 1980-aj jaroj, kio havis grandegan klerigan signifon. Mi, persone, ricevis la sistemajn sciojn pri la temo dank' al tiuj prelegoj kaj pruntitaj de li libroj… Liaj plej ŝatataj Esperanto-poetoj kaj movadanoj estis Nikolao Hohlov, Georgo Deŝkin kaj Alesandr Saĥarov, kies vivojn li esploradis. La bibliotekon li, laŭ ekzemplo de A. Saĥarov**,** testamentis al la Ŝtata Fremdlingva Biblioteko, kaj ĝi daŭre servos al la interesitaj esperantistoj.

Al la sfero de liaj interesoj apartenis ankaŭ historio de religio kaj deveno de kristanismo. Liaj artikoloj-prelegoj pri la temo, eble, ie restis en la hejma arkivo. Rilate al religio li havis iun specialan vidpunkton: ĉiam asertis, ke li ne estas ateisto (sed estas "ajnisto"), kaj kredas ne je iu dio, sed je la homo.

Kio krome? Nu, li iom scipovis ludi pianon kaj gitaron kaj klasikmaniere kantis.

Tokarev estis aktiva instruisto de Esperanto. Al la instruado li rilatis tre serioze, profunde studadis ĉiujn teoriojn kaj praktikajn metodojn. Plej longe kaj serioze li instruis Esperanton sur ĉiuj niveloj al blinduloj, kaj alta nivelo de la Moskva klubo de blindaj esperantistoj en 1970-aj – 80-aj jaroj signife ŝuldis al lia agado. Li povis legi kaj skribi brajle, kio multe helpis tiun instruadon.

Kiel eminenta instruisto kaj kulturscianto, li, kune kun Boris Kolker, iniciatis kreon de Ĉefa Atesta Komisiono de SEU (poste – REU) kaj ellaboris la unuajn ekzamenprogramojn por ĝi.

Li estis esperantisto, sed ja li estis profesie kemiisto (kiel li diris ŝerce: "А в миру я химик"), kandidato de kemiaj sciencoj, docento de Forstista Instituto kaj Moskva Kemia-Teknologia Instituto "D.I. Mendelejev". Li interesiĝis pri diversaj problemoj, ligitaj kun ĝeneralaj demandoj de kemio, i.a. pri origino de la vivo. Plurajn artikolojn pri kemio li publikigis en Esperanto en "Scienca Revuo". Estas supozo, ke lia malbonfarto dum lastaj vivojaroj kaj frua forpaso ŝuldas al veneniĝo pro iuj reagiloj dum eksperimentoj.

Mortis li 17.11.1994. Lia publikigita libro- kaj broŝurforma heredaĵo konsistas el 6 eroj:

Psikologio kaj metodiko de Esperanto-instruado: (Gvidilo por Esperanto-instruisto). 1984

Versoj. Ĥarkovo: UkrEA, Literatura Tradukista Komisiono; 1991

Rudaki, Abu-Abdallah. Versoj. Traduko de B.Tokarev. Duŝanbe: Ĉefa Scienca Redakcio de Taĝikia Soveta Enciklopedio; 1991

Ardes: originala romano en Esperanto. Moskvo: Impeto; 1996

Vivo de Prometeo. Moskvo: Impeto; 1996

Miĥail Lermontov. Mcyri: poemo. Traduko de B. Tokarev. Moskvo: Eŭropa Jura Universitato JUSTO; 1999

Nikolao Gudskov

Bonifatio Tornado

LA HOMO

Mi estas besteto, subtila kaj febla,
kun timo senĉesa, konstanta singard';
kaj ĉiam danĝeron supozas mi ebla,
streĉiĝas timeme pro fremda rigard'.

Mi estas la drako, multkapa, kruela,
teruron portanta al ĉiu estaĵ',
fajregon sputanta la monstro fabela,
en certa kaj impertinenta kuraĝ'.

Mi estas la besto, sovaĝa, perfida,
kun mano prenema kaj akra dentar',
envia rigard': kun fervoro avida
mi kaptas kaj tenas en stulta avar'.

Mi estas la besto, ameme karesa,
mi ĝuas ŝin premi, rigardi sen fin';
degelas volupte en vol' sinforgesa
refande miksiĝi kun korpo de in'.

Mi estas la besto kuraĝa, fidela,
por idojn defendi de fremda atenc';
sed tiom malica kaj tiom kruela,
al ĉiu fremdulo malforta sen senc'.

Mi estas formik' laborema, senlaca,
portanta dekoble ol pezas mi mem;
en mia senfina serĉado – aŭdaca,
iranta la vojon kun plendoj kaj ĝem'.

Mi longe meditas, estante la sola,
sopiras, hezitas sen firma decid';
senpense kun fluo mi iras popola,
kun sento amasa kaj blinda konfid'.

Kaj estas mi ero de multmiliona
pugnego, potenca en la unuec',
de l' horo en la Univers' unisona,
de la neskuebla rokego la pec'.

Jen – stranga alojo – de l' homo esenco:
kaprice varia penetra imag',
de l' penso serĉanta senlima potenco,
kaj stulta kruelo de tuja reag'.

Ne estas malbono mi, nek la perfekto;
nur karno pulsanta min gvidas laŭ ond'.
Mi estas – de l' vivo hazarda elekto,
terura estaĵo, fiero de l' mond'.

Al la 120-jariĝo de Pjotr Jefimoviĉ Astafjev (7.07.1897 – 23.01.1987)

Mia esperantista biografio

Ŝajne en marto de 1914 jaro en konata de mi pola familio mi ricevis donace libreton, eldonitan en Varsovio sub titolo «Д-р Эсперанто. Международный язык. Полный учебник для русских».

Mi jam sciis pri la ekzistado de tiu lingvo, ĉar antaŭ du jaroj mi legis artikolon pri ĝi en tiam populara revuo «Вестник знания» ("Heroldo de la Scio"), kaj ĝi vekis en mi grandan intereson. La donaco entuziasmigis por tuja lernado de tiu lingvo.

Baldaŭ mi konatiĝis kun la unuaj samaraj esperantistoj (A.Kolĉin kaj A.Oĥitoviĉ, fervojaj oficistoj). Estis abonita de mi la revuo "La Ondo de Esperanto" (Moskvo), akiritaj la unuaj libroj en la internacia lingvo, nome "Patroj kaj filoj" de Turgenev en traduko de fama esper. stilisto K.Bein (Kabe) kaj

“Princo Serebrjanij” de A.K.Tolstoj en traduko de Ŝidlovskaja.
En la sama jaro eksplodis la Unua mondmilito kaj tio malhelpis la internacian korespondadon.
Tiam mi estis jam 17-jara knabo kaj pretiĝis, post specialaj ekzamenoj, fariĝi popola instruisto. Aŭtune mi ricevis la oficon en la regiono de Buguruslan.
La unuajn publikaĵojn, kiel esperantisto, en komencaj monatoj de 1918 jaro mi faris, kiam mi revenis post dujara militservo en Samaron. Sed en la fino de la jaro mi ree devis militservi. Nur en la fino de 1920 jaro, jam en Ĉitá, mi estis liberigita por civila laboro. Tie komenciĝis la dua periodo de mia plej aktiva agado.
Kune kun ĉitaaj esperantistaj aktivuloj (Kurbatov, Baĵenov kaj aliaj) mi partoprenis en la organiza laboro (prelegoj, kursoj). Sed ĝuste tiam komenciĝis mia aktiva literatura laboro en kelkaj eldonaĵoj. En 1921 jaro unu literaturisto eldonis almanakon “Vortoj kaj makuloj” kun paralela traduko en esperanto. Krom ke ĉiuj versaĵoj en la almanako estis tradukitaj de mi, mi ricevis du paĝojn por miaj propraj originalaj verkoj en esperanto (poemo en prozo “La Nova Babelo” kaj tri aŭ kvar versaĵoj). Poste alia eldonisto proponis al mi organizi esperantan fakon en lia nova belarta revuo “Voŝhod“.
Kun reveno al Samara (komenco de 1923 j.) mi ne plu pensis pri la verkado kaj tradukado, kvankam same, kiel en Ĉita, mi ricevis la oficon de teknika redaktoro komence en la sama profesia unuiĝo de poŝtoficistoj (monata bulteno “Voĉo de Ligilistoj”) kaj post du jaroj en la redakcio de “Volĵskaja kommuna” (1925-1933). Se en la unuaj du jaroj en Samara mi povis organizi kaj gvidi kurson kaj laboron de la unua rondeto (ĉirkaŭ 40 anoj), nun, ĉar mia laboro estis dumnokta, kaj ĉio, kion mi povis fari por Esperanto, estis la organizo de la gubernia komitato kaj la koresponda grupo de laboristaj korespondantoj.
Por fini la noktan laboron en tipografiaj kondiĉoj mi eksiĝis el la eldonejo de “Volĵskaja kommuna” kaj forveturis al Uljanovsk (la redakcio de “Proleta vojo”), poste en vilaĝon (en redakcio de “Politotdel MTS”), kaj fine kiel sekretario en redakcio de “Степные известия” (Bolŝaja Gluŝica). Finfine en 1936 mi decidis reveni al instruista laboro (komence en Smiŝljajevka apud Kujbiŝev, poste, reveninte en fino de 1945 jaro el la armeo, en Kirovskij regiono de Kujbiŝev). Nur en 1957 jaro, kiam mi fariĝis pensiulo, mi dediĉis mian tutan liberan tempon por agado esperantista.
Tiam mi rekomencis ankaŭ la tradukan laboron el miaj plej amataj poetoj Puŝkin kaj Majakovskij. Tiam komenciĝis miaj kontaktoj kun aliaj samideanoj-tradukistoj kaj poetoj: G.Deŝkin (Miĉurinsk), J.Lubjanovskij (Ostrogoĵsk), A.Tolokoncev (Kostroma), N. Ŝtejnberg (Ĉernovci) kaj kelkaj aliaj.
La unua publikaĵo estis mia traduko el Puŝkin (“Gabrieliado”). Poste en iaj revuoj ankoraŭ kelkaj tradukitaj versaĵoj.
El Majakovskij mi tradukadis preskaŭ ĉiujn liajn la plej popularajn poemojn kaj apartajn versaĵojn. Sed konscias, ke tiuj tradukoj por esti pli malpli kontentigaj postulas ankoraŭ pluan laboron super ili. Tial mi ne rapidas strebi la publikadon. Iom post iom mi esperas ankoraŭ korekti la malnetajn manuskriptojn.

P. Astafjev, Marto 1980 j.

Noto de la redakcio de “Bulteno de REU”: *Ni nenion ŝanĝis en la aŭtentika teksto de P. Astafjev, konsiderante ĝin historia dokumento.*

Fjodor Tjutĉev

SILENTIUM!

Silentu, kaŝu en latent'
Pri viaj revoj kaj pri sent'!
En la animo restu brili
Kaj tie estingiĝu ili,
Kiel stelar' en firmament'
Admiru ilin – kaj silent'!

Ĉu povas kor' esprimi sin?
Ĉu aliul' komprenos vin?
Kun via mensa vivosfero?
Pens' eldirita – jam malvero.
Malpuras font' en formoment'.
El ĝi vin nutru – kaj silent'!

Do vivu en interna mond'.
En ĝi boladas vasta ond'
Kaj pensoj sorĉaj kaj misteraj,
Blindigos ilin lum' ekstera,
Disblovos ilin kruda vent'
Atentu ilin – kaj silent'.

Tradukis Pjotr Astafjev

Aranĝoj

Paralela Universo en Moskvo mojosas

La 19-an de aŭgusto okazis mirinda renkontiĝo, kadre de la internacia Paralela Universo. Ĝi nomiĝis "30/60", omaĝe al la jubileoj de Anna Striganova kaj Valentin Melnikov.
Tio eĉ ne estis MER, sed malgraŭ la aŭgusta "dormanta sezono" partoprenis 19 esperantistoj el 4 landoj (Rusio, Bjelorusio, Peruo kaj Brazilo). Ni memorigas, ke tiaspecaj renkontiĝoj okazas nur en Esperantujo!

La renkontiĝo neatendite por ĉiuj iĝis unu el la plej etosaj kaj mojosaj, kiuj okazis en nia hejmo. Poezia tago-vespero konsistis el poeziaj deklamoj de Valentin Melnikon, Ludmila Novikova kaj Klara Ilutoviĉ (mem!).
Krom la realaj partoprenantoj estis ankaŭ la virtualaj. Dum la aranĝo estis organizita "skajpoponto" kun Kopenhago, kie samtempe okazis aranĝo de Paralela Universo. La aranĝon skajpe ankaŭ partoprenis Mikaelo Bronŝteĵn, kiu deklamis la poemon.
Estis ŝoke riĉa koncerta progamo. Malgraŭ malĉeesto de la tradiciaj gitaristoj de MER, okazis internacia koncerto, dum kiu Aleksandr Lebe-

dev plenumis kelkajn “orajn” kantojn; Aleksandr Vikulov – plurajn kantojn, inkluzive tiujn de *Kajto,* Kim kaj *Persone;* Sara el Brazilo kaj Miguel el Peruo kantis kelkajn konatajn en Esperantujo kantojn.
Unue en la historio de tiaj aranĝoj okazis “bambado” (dancado de la konata mojosa kanto) kaj “amika rondo” (jes, jes... tiu “Por Esperanto...” kaj jes, kun la kantado de “Ni renkontiĝos...”).
La “oficiala” programo daŭris 7 horojn kaj kelkajn horojn post la neoficiala parto.

Dima Ŝevĉenko

RA-12 en la Altaja montaro

La 1-an – la 11-an de julio 2017 en Respubliko Altajo (Rusio) en Altaja montaro en Aktru (Geografia Bazejo de Tomska Ŝtata Universitato) sukcese okazis “Renkontiĝo de Amikoj – 12” (RA-12). Partoprenis grupo el 18 personoj: 6 viroj kaj 12 virinoj el diversaj partoj de la lando.
Ni loĝis je 2050 metroj super la marnivelo. Ĉiutage okazis turistaj marŝadoj laŭ montoj, ni grimpadis sur krutajn rokojn. En la dua tago ni grimpis proksimume ĝis 2800 metroj super la marnivelo sur montsupran glaĉeron. En alia tago plejmulto de niaj esperantistoj grimpis ĝis montpasejo Instruisto, kiu situas je 3000 metroj super la marnivelo. Ĉiuvespere post la marŝadoj okazis Esperanto-kursoj por komencantoj kaj progresantoj, lingvaj kaj aliaj ludoj, rajdadoj sur ĉevaloj, festenoj ktp.
En junio 2017 en Siberio estis eksterordinare varma vetero. Tial ni ĝuis friskan veteron en Aktru. Se la tutmonda plivarmiĝo daŭros en aliaj jaroj, eblos organizi aliajn "Renkontiĝojn de Amikoj" en Aktru ĉiujare.

Vladimir Minin

<u>Eventoj surloke</u>

Donaj Esperanto-Ludoj

25-28-an de aŭgusto Novoĉerkaska Esperanto-klubo “Novoĉ-EK!” aranĝis E-renkontiĝon “Donaj Esperanto-Ludoj-1” – DELOj-1. Ĝi okazis en la ekzotika loko de Rostova regiono – Etna-arkeologia turista centro “La Kaŝita Mondo”. Ĝin partoprenis 24 personoj el Novoĉerkasko kaj Volgodonsko kun la aĝo de 2 ĝis 85. La programo ne estis tre serioza, strikta kaj streĉa – la ludoj ja, la rivero ja, ripozo ja, fiŝkaptado finfine kaj la tradicia fiŝa supo. Tamen tio ne signifas ke Esperanto ankaŭ ripozis! Ĝi funkciis kaj ĉe tablo, kaj sur la bordo de la trafluejo, kaj dum la fiŝkaptado, kaj dum la ekskurso tra “La kaŝita Mondo”. Ne ĉiujn ideojn ni sukcesis efektivigi, tamen ni allogis en Esperantujon novulojn kaj interesiĝantojn pri Esperanto, konatiĝis kun bela interesa loko kaj praktikis la lingvon pere de interagaj programeroj.

Irina Gorodeckaja

“Mia MASI” – nova informfoliaro pri praktika agado

La Konferenco en Poŝeĥonjo (6-7.08.2017) rekomendas al la kluboj-membroj de REU studi kaj sekvi la spertojn de MEA MASI. Por faciligi plenumon de tiu rekomendo MEA MASI komencas eldonadon de interreta informfoliaro “Mia MASI”. La unua numero aperis la 1-an de septembro. Sur la 16 paĝoj estas prezentitaj iuj el MASI-agadoj, okazintaj aŭguste. Tiu priskribo prezentas la kopieblan modelon de la agado. La informfoliaron "Mia MASI" eblas elŝuti ĉe <http://miamasi.weebly.com/> aŭ legi ĉi tie: <https://drive.google.com/file/d/0B30hvE9q7477NkJBempObGpGeUU/view>.

“Esperanto: La Unua Kanalo” iĝis dujara

Dum ekzisto de la kanalo aperis pli ol 70 videoj, kiuj estis spektitaj 42000 fojojn. Evidentiĝis, ke la kanalo estas la unua en la tutmonda Esperantujo, kiu akcentas sian atenton al intervjuoj kun esperantistoj. Tamen jam ekzistas temaj videoj: sciencaj prelegoj, deklamado de poezio, famaj kantistoj, libroj en Esperanto ktp – kaj ni intencas tion daŭrigi. Ĉefa motoro kaj teknika prizorganto de la kanalo estas ***Aleksandr Basov (Karter)***. Abonu nian kanalon! <https://www.youtube.com/channel/UCmXNo743zPZTgb1xmHFiUDA>

Novaj libroj

Sortoj frakasitaj

Mikaelo Bronŝtejn. Eseo en Esperanto. – M.: Impeto, 2017. – 50 p., ISBN 978-5-7161-0299-6

La eseo “Sortoj frakasitaj” logike suplementas la romanon de Mikaelo Bronŝtejn «Mi stelojn jungis al revado» (Impeto, M., 2016). Per analizo de multaj dokumentoj, antaŭe ne konataj, perditaj aŭ forgesitaj la aŭtoro prezentas biografiojn de ses diversnaciaj literaturistoj, sukcese kaj talente verkintaj en Esperanto. Ĉiuj ili estis reprezaliitaj pro falsaj akuzoj en la epoko de la stalina teroro, ĉiuj estis rehonorigitaj poste.

La libro estas destinita por ŝatantoj de la historio, posedantaj la lingvon Esperanto.

La libron eblas mendi ĉe <Lernolibro.Ru> (por loĝantoj de Rusio).

La Bulteno de REU (BdR) atendas viajn lokajn, regionajn novaĵojn! Bonvolu sendi ilin al Nikolao Gudskov <nikolao@yandex.ru> aŭ (kaj) Svetlana Smetanina <svsmetanina@yandex.ru>.

Estraro de Rusia Esperantista Unio

Eksciu, ke...

UNESKO-KURIERO EN ESPERANTO ELDONIĜIS

Unesko-Kuriero estas la oficiala revuo de Unesko (Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj por Edukado, Scienco kaj Kulturo). Ĝi ekaperis en 1946. Kiel grava komunikilo por disvastigi la ideojn de Unesko kaj promocii la interkulturajn dialogojn, la revuo iam ludis gvidan rolon por disvolvi la misiojn de Unesko en la kampoj pri kiuj ĝi respondecas.

Antaŭ jaroj multaj esperantistoj alvokis ke Unesko eldonu ĝin ankaŭ en Esperanto. Amaso da retaj mesaĝoj bombe ĝenis la funkciulojn de Unesko, kiuj kelkfoje respondis: "se UEA aŭ iu alia pretas financi ĉion, Unesko pretas doni permeson al Esperanta eldono de *Unesko-Kuriero*." (*el Eventoj, n-ro 182, 2/marto, 2000*). Bedaŭrinde la revuo ĉesis ekde 2012 pro manko de financaj rimedoj.

En majo 2017, post reapero de la 76-paĝa plenkolora *Unesko-Kuriero* en la formato A4, UEA tuj lanĉis projekton pri eksperimenta eldono de *Unesko-Kuriero* en Esperanto, laŭ iniciato de la UEA-komitatano Trezoro Huang Yinbao, direktoro de Esperanto-Centro Ora Ponto (Ĉinio). Dank' al kortuŝa kunlaboro de 36 tradukintoj kaj provlegintoj en 23 landoj kaj financa subvencio de Esperanto-Centro Ora Ponto, la 1-a numero de *Unesko-Kuriero* en Esperanto estas eldonita. La du versioj en Esperanto estas same aspektaj kiel la UN-lingvaj versioj.

La papera versio (ISSN 2521-7356) aĉeteblas ĉe la Libroservo de UEA. La reta versio (ISSN 2521-7364) estas senpage elŝutebla ĉe UEA-retejo: <http://uea.org/pdf/Unesko-Kuriero_1-2017.pdf>.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

NOVA HONORA MEMBRO DE UEA: NGUYỄN XUÂN THU

NGUYỄN Xuân Thu (nask. 1932-08-23). Profesie farmaciisto, esperantistiĝis en 1957. Estis ĝenerala sekretario de Vjetnama Esperanto-Asocio (VEA) de 2004 ĝis 2010. Membro de la Centra Komitato de VEA kaj estro de la trejna komisiono. Elstare kontribuis al la instruado de Esperanto kaj trejnado de instruistoj. Membro de la Internacia Rajtigita Ekzamenantaro de UEA/ILEI ekde 2006. Ĉefdelegito de UEA de 2003 ĝis 2011. Kiel ĝenerala sekretario de VEA gvidis la laborojn por inviti la 97-an UK-on (2012) al Vjetnamio kaj poste estis ĝia LKK-ano pri informado kaj gazetara servo; kunlabore kun <edukado.net>, aŭtoris belan plurlecionan preparkurson pri sia lando. Kiel longtempa instruisto de Esperanto en la Fremdlingva Universitato de Hanojo li ankaŭ trejnis gejunulojn por labori kiel helpantoj dum la 97-a UK kaj la 68-a IJK, same kiel li pli frue faris por la 63-a IJK (2007). Al la programo de la UK li kontribuis per prelegoj en la Esperantologia Konferenco kaj la Tago de Vjetnamio. Lia ĉefverko estas "Granda Espe-

ranto-Vjetnama Vortaro” (2016) kun 10 652 kapvortoj. Krome li tradukis kaj redaktis la Esperanto-version de “Taglibro de Dang Thuy Tram” (2011). Jam frue li aktive ekuzis *Facebook* k.a. eblojn de Interreto, i.a. kiel kunlaboranto de <edukado.net> kaj redaktanto de la retejo de VEA (http//e.vea.vn). Ekde 2013 Nguyễn Xuân Thu estas membro de la Akademio de Esperanto kaj gvidanto de ĝia komisiono pri homaj nomoj.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

UEA DIPLOMIS 8 ELSTARAJN AGANTOJN

En la Solena Fermo de la 102-a Universala Kongreso en Seulo estis anoncitaj la nomoj de 8 ricevantoj de Diplomo pri Elstara Agado kaj de Diplomo pri Elstara Arta Agado. Tiuj diplomoj estas aljuĝataj de la Estraro de UEA ekde 2007.

Normand FLEURY (Kanado)

Motoro de la kebekia movado dum pli ol tridek jaroj, ĉeforganizanto interalie de la Internacia Junulara Kongreso en 1992 kaj la Tutamerika Kongreso de Esperanto en 2008.

Ronald GLOSSOP (Usono)

Profesoro pri paco-studoj, dum jardekoj aktiva verkisto kaj preleganto pri la rilatoj inter Esperanto, paco kaj internacia kompreniĝo.

Halina KOMAR (Pollando)

Elstara aktivulo pri informado, i.a. kadre de la ekonomiaj pintkunvenoj en Krynica, la muzikfestivalo Woodstock, la pola parlamento kaj medioj de la t.n. Tria Aĝo.

Jonas MARX (arta, Germanio)

Majstro de repa muzika stilo en Esperanto, kies koncertoj entuziasmigas junan kaj ankaŭ ne tiel junan publikon.

Germian PIRLOT (Belgio)

Aktivulo pri instruado dum multaj jaroj, i.a. efika helpanto por la instruado de Esperanto en Afriko kaj senlaca kompilanto de la registro de Esperanto-kursoj tutmonde.

Jérémie SABIYUMVA (Burundo)

Talenta motoro de la movado en Burundo, unu el la plej viglaj landaj movadoj en Afriko, kaj aktiva kunlaboranto pri la tutafrika movado.

Eduardo VIVANCOS (Kanado)

Instruisto kaj varbanto por la movado dum ok jardekoj, inkluzive de la plej malfacilaj kondiĉoj en malliberejoj kaj koncentrejoj; ankaŭ aktiva en Sennacieca Asocio Tutmonda.

WANG Minhao (Ĉinio)

Multjara motoro de la movado en Ŝanhajo, talenta instruisto kaj ĉeforganizanto de internaciaj kongresoj inkluzive de Internacia Fervojista Kongreso en 2015.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

FORPASIS MIKAELO GIŜPLING

La 26-an de septembro 2017 forpasis Mikaelo (Miĥail Jakovleviĉ) Giŝpling – elstara sovetia, rusia kaj israela esperantisto, eminenta poeto, tutmonde konata en Esperantujo.

Mikaelo Giŝpling naskiĝis en 1924 en la siberia urbo Irkutsk, ekde 1943 loĝis en Moskvo kaj studis en moskva instituto de kemio. En la sama jaro li eklernis Esperanton aŭtodidakte laŭ la broŝuro de N. Kabanov, eldonita ankoraŭ en 1909, poste daŭrigis la lernadon per la lernolibro de A. Saĥarov. En 1957, kiam en Moskvo okazis Tutmonda Festivalo de junularo kaj studentoj kaj estis preparata grupo de gejunuloj, kiuj povus partopreni en la koncernaj aranĝoj, M. Giŝpling konatiĝis kun esperantistoj. Ekde tiam li aliĝis al aktiva agado, baldaŭ fondis junularan E-klubon "Fajrero" kaj fariĝis ĝia prezidanto.

Ekde 1998 la poeto loĝis en Israelo.

Fine de la 1980-aj jaroj, jam meze de la sepa jardeko de sia vivo, Giŝpling komencis tradukadi ruslingvajn poemojn en Esperanton kaj en 1991 ekverkis originale. Liaj verkoj aperadis en la organo de Moskva Literatura Esperanto-klubo "Cerbe kaj Kore", en la revuoj "Monato", "Scienco kaj Kulturo". En 2000 M. Giŝpling gajnis la unuan premion en Belartaj Konkursoj de UEA por la ciklo de poemoj "Neĝa fantazio", kaj en 2004 – samtempe la unuan kaj duan premiojn en la poezia branĉo de tiuj Konkursoj.

La unua poemaro de M. Giŝpling "El sisma zono" estis eldonita de Flandra Esperanto-Ligo en la serio "Stafeto" en 1994. William Auld enigis tiun libron en la liston de plej legindaj poeziaj kolektoj kaj skribis en la antaŭparolo por ĝi: "Jam delonge mi ne renkontis tian aŭtentikan lirikiston, tian versmajstron, kies fortaj rimoj kaj vortmuziko enkadrigas temojn vere trafajn kaj studindajn… Giŝpling estas poeto, kiu profitas el klasikaj normoj, sed alportas al ili frapan freŝecon". La dua libro"Eola harpo" estis eldonita de Eŭropa Jura Universitato "Justo" en 1999 en Moskvo. La trian poemaron "Tie ĉi tie" denove eldonis

Flandra Esperanto-Ligo en 2003, kaj la kvaran poemaron "Vespere" – la moskva eldonejo "Impeto" en 2008.

En la antaŭparolo (januaro 2007) al sia kvara poemaro la aŭtoro skribis: "Kaj denove – versaĵoj en Esperanto. Jen antaŭ vi kuŝas mia kvara poemaro. Ĉu ne sufiĉas? Oni jam diras al mi: "por kio vi vane elspezas vian tempon kaj skribas en la lingvo, kiu havas la solan destinon – ĉiam resti sur vojrando de la tutmonda kulturo? Kial vi ne verkas en la rusa aŭ alia nacia lingvo? Esperanto estas efemera fenomeno kaj neeviteble pli-malpli baldaŭ malaperos".

Spite al la voĉoj de la kritikantoj, mi pensas, ke tiu ĉi "artefarita" lingvo jam pruvas sian mirindan vivkapablecon dum multaj jaroj, kaj ĝia plua sorto, laŭ mia opinio, tute ne aspektas tiom malĝoja. Ĉi-jare ni celebros ĝian 120-an datrevenon. Alivorte – Esperanto meritas kaj havos pli feliĉan estontecon. Krom tio, Esperanto jam delonge estas literatura lingvo. Ĝi permesas bone esprimi pensojn kaj sentojn de la homo, kaj pro tio verkado en Esperanto alportas plezuron al aŭtoro."

Memore al M. Giŝpling mi prezentas liajn bonegajn versaĵojn:

ESPERANTO

En la brua orkestro mi aŭskultas la aldon,
Kiun dampas la batoj de feroca tambur'…
Kuraĝago de herbo, kiu boras asfalton
Kaj leviĝas tra fendoj al la suna lazur'.

La tamburo bruegas sub aklamaj instigoj,
Sed la kanton de l' aldo ne ĉesigas la damp'…
Kuraĝago de herbo, kies floroj kaj tigoj
Per botetoj kaj hufoj dispremiĝas sur kamp'.

Vivkapablas la ido de la kordoj kaj arĉo,
Se ĝi flirtas en bruo, kiel gaja hirund'…
Kuraĝago de herbo, kiu falas dum falĉo,
Sed sukcesas restigi sian ĝermon en grund'.

La muziko triumfas, kaj penetras la planto
Tra beton', kaj perforton superfortas l' esper',
Kaj finfine alvenos al la venk' Esperanto
Kun la herbo floranta, kun la kant' kaj la ver'.

LA LINGVO DE ESPERO

Por kio versas mi en lingvo, kiun konas
Apenaŭ dudek mil stranguloj en la mond'?
Kaj eĉ el tiu kvant' nur tre malvasta rond'

La poezion ŝatas kaj bezonas.

Verdire tio ĉi ne multe min afliktas.
Mi skribas ne por mend', sed sole por mi mem:
El maro de la viv' emerĝas nova tem'
Kaj tekston de poem' en tiu lingvo diktas.

Min logas tiu ĉi komuna idiomo –
La lingvo de esper' de Majstro Zamenhof,
Belsona, kiel flut', por poezia strof'
Kaj kuniganta homon kun la homo.

Kaj ne certigu min, ke l' celo estas mita,
Ke en la lingvo mem forestas ĉia senc',
Ke fakte estas ĝi nur revo, nur intenc',
Per kiuj la infer' jam estas pavimita.

Ligiĝis mia vers' al lingvo Esperanto.
Se ĝi ekzistos plu, do restos mia spur',
Se iam mortos ĝi, do mortos mia kanto…
Sed nun mi versu – juĝu la futur'.

* * *

Jam finiĝis miaj vagoj,
Ŝutas neĝon frostaj vintroj
Kaj forfluas miaj tagoj,
Kiel akvo inter fingroj.
Kaj vizitas min pli ofte
Dolĉa kaj malica tento,
Kiu flustras softe, softe
Pri trankvilo kaj silento.
Tamen post la pord' ekstera
Plue brilas, pulsas, bruas
La freneza mondo tera,
Kiu logas min kaj skuas.
Kaj mi tute malracie
Pretas pagi multekoste,
Nur por ke mi povu scii,
Kio do okazos poste.

Ĉe la adreso <https://vimeo.com/15003630> eblas vidi la filmon memore al la poeto.

Raja Kudrjavceva (Jekaterinburg)

REZULTOJ DE LA BELARTAJ KONKURSOJ DE UEA EN 2017

BRANĈO POEZIO

Unua premio al **Nicolau Dols**, Hispanio, pro "*Pasio. Poemo en ses stacioj*".
Dua premio al **Jesper Lykke Jacobsen**, Francio, pro "*Kosmogonio*".
Tria premio al **Lode Van de Velde**, Belgio, pro "*Nebulo*".
Juĝkomisiono: István Ertl, Krys Williams, Giulio Cappa.
Partoprenis 31 verkoj de 15 aŭtoroj el 10 landoj.

BRANĈO PROZO

Unua premio ne aljuĝita.
Dua premio al **Ewa Grochowska**, Francio, pro "*La neĝero*".
Tria premio al **Laure Patas d' Illiers**, Francio, pro "*En tiu ĉi bela tago*".
Honora mencio al **Carys Goldy**, Britio, pro "*Tri vortoj*".
Juĝkomisiono: Trevor Steele, Ĵak Le Puil, Tim Westover.
Partoprenis 20 verkoj de 13 aŭtoroj el 9 landoj.

BRANĈO TEATRAĴO

Unua premio ne aljuĝita.
Dua premio ne aljuĝita.
Tria premio al **Amir Naor**, Israelo, pro "*Amo ne serĉas, amo trovas*".
Honora mencio al **Ewa Grochowska**, Francio, pro "*Stranga renkontiĝo*".
Juĝkomisiono: Wera Blanke, Serĝo Sir', Giuliano Turone.
Patroprenis 2 verkoj de 2 aŭtoroj el 2 landoj.

BRANĈO ESEO

Unua premio – premio Luigi Minnaja – ne aljuĝita.
Dua premio al **Roberto Lloancy**, Francio, pro "*Kverelo sur Olimpo*".
Tria premio al **Javier Alcalde**, Hispanio, pro "*Pli bona ol la homa estaĵo? Esperanto kaj transhomismo*".
Honora mencio al **Javier Alcalde**, Hispanio, pro *"La Esperantisto de la jaro (1887-1997)"*.
Juĝkomisiono: Gotoo Hitoshi, Antonio Valén, Giridhar Rao.
Partoprenis 5 verkoj de 4 aŭtoroj el 4 landoj.

INFANLIBRO DE LA JARO

Eldonejo Graine de Moutard, Francio, pro "**La sekreto de la strigo de Diĵono**" de Magali Lautrou.
Juĝkomisiono: Edmund Grimley Evans, Ricardo Albert Reyna, James Rezende Piton.
Partoprenis 2 verkoj de 2 eldonejoj el 2 landoj.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

Omaĝe al la 125-jara jubileo

Marina Cvetajeva (1892-1941)

Ludmila Novikova (Moskvo)

MARINA, MARINA – RUSIA DOLOR'

Kaj laste vi kantis cigninan kanzonon…[1]

En ĉi-jara julio mi kun mia filino vizitis la malnovan provincan rusian urbeton, situantan en Tatario sur bordo de la rivero Kama. Ni venis tien speciale omaĝe al Marina Cvetajeva, mia plej amata rusa poetino. Klasikulo de la Arĝenta epoko de la rusa literaturo, ŝi okupas apartan lokon en la koro de ĉiu ŝatanto de la rusa poezio. Eble pro la senprecedenca tragikeco de ŝia sorto, kiun ŝi antaŭsentis ekde sia junaĝo kaj kiu estis kun doloriga esprimforto reflektita en ŝia poezio.

La tuta vivo de Cvetajeva ekde frua junaĝo estis tragika. En la 14-jara aĝo ŝi perdis la patrinon, kiu mortis pro tuberkulozo. Komenco de la Unua mondmilito kaj la sekvintaj ĝin Februara kaj Oktobra revolucioj kun posta intercivitana milito en Rusio plene detruis bonfartan familian vivon de la poetino: post la foriro de ŝia edzo Sergej Efron al la Volontulisma Blanka Armeo ĉe Dono, kie li batalis kontraŭ la bolŝevistoj kaj poste elmigris el Rusio, ŝi en la aĝo 25 jaroj restis en la revolucia Moskvo tute sola kun du malgrandaj filinoj – sen profesio, sen laboro, sen la heredita havaĵo, perdita pro ties alŝtatigo, havante nenian sperton pri la memstara vivtenado. En januaro 1920 ŝia 3-jara filineto Irina mortis en la infana orfejo, kien Cvetajeva lokis siajn filinojn pro nekapablo vivteni ilin. La malsanan pli aĝan filinon Ariadna ŝi sukcesis savi, reveniginte ŝin hejmen, sed la morto de Irinjo faris novan profundan vundon en ŝia animo.

la lasta loĝejo de M. Cvetajeva en Jelabuga

[1] Citaĵo el la versaĵo "Mi venis ĉi tien…" de L. Novikova (vidu fine de la eseo).

Marina Cvetajeva elektis maldolĉan frukton de sorpujo kiel simbolon de sia amara vivo. En la poemo, dediĉita al la filino Ariadna, ŝi profetis la saman sorton al ŝi:

Sibilo! Por kio porci'
Al id' mia – da tia sorto?
Ja rusa destino – por ŝi…
Viv' ŝia: Rusio kaj sorpo…[1]

(El la poemo «Al Alnjo», 1918)

Elmigrinte kun ŝi en 1922 al Ĉeĥio, kie situis tiutempe Sergej Efron, kaj poste al Francio, la poetino ne reakiris iaman feliĉon. La tutan vivon en la kondiĉoj de elmigro ŝi suferis pro manko de propra loĝejo, mono, pro ĉiutagaj rutinaĵoj, malhelpantaj al ŝia poezia kreado, anima deprimo, diskordo en la medio de la "kolegoj" – elmigrintaj rusaj literaturistoj. La naskiĝinta en 1925 filo Georgij (hejma nomo Mur), kvankam estis verve amata de ŝi, aldonis por la tuta posta vivo de Marina nur zorgojn kaj malagrablaĵojn kaj fine, kiel opinias multaj samtempuloj de la poetino, estis unu el la plej gravaj kialoj de ŝia sinmortigo.

Cvetajeva sentis sin ekster Rusio solece, pri kio ŝi mem skribis en la eseo "Mia sorto de poeto": "Mian malsukceson en la elmigro kaŭzis tio, ke mi estas *ne*-elmigrinto, ke mi pro la spirito... *tie*, *tien*, *de tie*... Mi estas en terura krea soleco". Tragikecon de sia tiama stato ŝi plej forte esprimis en la poemo "La patrotero. Nostalgi'!":

...Ĉar samegalas, kiu kaĝ'
Hirtigu min, kaptit-leonon,
Kaj kiu homamasa kraĉ'
Forpelu – fojon milionan –
Min al soleca sinkompren'.
Nordurso sen glacia peco,
Mi ne elvivos (vanas pen'!),
Kaj kie – kia diferenco?!...

(*el la poemo "La patrotero! Nostalgi'", 1934*)

En 1937 okazis nova drameca situacio en la familio de Cvetajeva: ŝia edzo kun la filino Ariadna subite unu post la alia forveturis al USSR. Evidentiĝis, ke Sergej Efron kaŝe kunlaboris kun la sekretaj servoj de Soveta Unio, plenumante ties taskojn. Post lia partopreno, kvankam ne rekta, en krima afero (murdo de la rifuĝinta sovetia spiono Ignatij Rejss (Ludvig Poreckij)), li estis devigita urĝe forlasi Francion kaj rifuĝi al USSR. Cvetajeva, kiu nenion sciis pri la kaŝa agado de la edzo, estis konsternita tiomgrade, ke dum duonjaro kapablis verki absolute nenion. Ŝi komprenis, ke ŝia reveno al la patrolando estas neevitebla malgraŭ ŝiaj grandaj

[1] Ĉiuj komentoj kaj la citataj tekstoj (originaloj kaj tradukoj) apartenas al la aŭtoro de la eseo.

duboj ĉi-rilate.

Ŝi suferis pro la vivo disde la patrolando, sed sciis, ke ŝi kiel verkisto malsukcesos en la komunista Rusio. Ŝi skribis en unu el siaj leteroj: “Ĉi tie mi estas *ne bezonata*. Tie mi *maleblos*”.

Tamen la Destino superis ŝiajn konsiderojn. Post komenco de la Dua mondmilito en 1939, ŝi, ektiminte pri la sorto de la filo, decidis reveni en la patrolandon, opiniante, ke tie estos malpli danĝere. Kiel ŝi eraris!

Tuj post ŝia veno en Sovetan Union estis arestitaj Ariadna kaj Sergej, akuzitaj pri “spionado”. Por Marina komenciĝis la vica “cirklo de la Infero”. Ŝi skribas leterojn al Lavrentij Berija[1] kun petego liberigi la familianojn aŭ almenaŭ permesi vizitojn al ili. Neniaj respondoj estis ricevitaj. La vivkondiĉoj de Cvetajeva kun la filo estas teruraj: sen konstanta loĝejo (ili ŝanĝis tri luitajn loĝejojn dum jaro), sen mono. Ŝi despere skribas: “Mi havas neniujn amikojn. Sed sen ili – pereo”. El la antaŭaj konataj literaturistoj nur Boris Pasternak subtenis ŝin. Laŭ lia peto Cvetajeva ricevis laboron de tradukisto, kiu donis al ŝi financan subtenon. Oni rifuzis membrigi ŝin kiel poeton en la Unio de verkistoj de USSR, ĉar ŝi ne havis verkarojn, eldonitajn en USSR. Aŭtune de 1940 Goslitizdat[2] planis eldoni verslibron de Cvetajeva, entenantan poemojn de la 1920-aj – 1940-aj jaroj, kiun la poetino plenespere preparadis. Tamen pro la negativa recenzo de la kritikisto K. Zelinskij la libro estis malpermesita por eldono.


Мурзика! Прости меня
за всё. Мне было бы хуже.
Я на грани-больна, это
уже не я. Люблю тебя
безумно. Пойми, что я больше
не могла быть.
Передай папе и Але – если
увидишь – что любила их. До послед-
ней минуты я боялась, что попасть
в тюрьму

la antaŭmorta mesaĝo al la filo

La komenco de la Patria milito en USSR en 1941 elvokis grandan maltrankvilon de Cvetajeva, timegon pro la plua sorto de la filo. La 8-an de aŭgusto ŝi kun Mur estis evakuita el Moskvo kun grupo de moskvaj literaturistoj kaj loĝigita en la provinca urbeto Jelabuga ĉe la rivero Kama...

Irante tra la pratempe aspektantaj stratoj de Jelabuga, mi provis imagi min en la tiamaj kondiĉoj, en kiujn trafis la poetino. Ekloĝo en la domo de fremdaj homoj ĝenas, senteblas ties kaŝa malfavora rilato al la stranga moskvanino kaj ŝia malafabla adoleska filo. Ŝi kapablas al neniu laboro, pro kio okazas ĉiutagaj kvereloj inter ŝi kaj la filo: li akuzas la patrinon pro nenifarado kaj postulas, ke ŝi klopodu translokiĝi al la najbara pli granda urbo Ĉistopol, kie estis dislokitaj aliaj moskvaj

[1] Estro de la sekreta polico de la Stalina reĝimo.
[2] Mallongigo de Ŝtata eldonejo de la beletra literaturo de USSR.

literaturistoj. Cvetajeva sub lia premo veturas al Ĉistopol kun la petskribo doni al ŝi laboron de manĝilarlavistino en la manĝejo de literaturistoj. Sed la peto estis rifuzita. Cvetajeva revenis al Jelabuga en stato de profunda anima deprimo.

Restinte en fremda loko sola, sen laboro, sen financa kaj morala subteno, en plena nescio pri la sorto de la edzo kaj la filino (ŝi estis neniam ekscionta, ke Ariadna ricevis ok jarojn de malliberigo en koncentrejoj kun posta ekzilo al Siberio kaj ŝia patro estis pafekzekutita en oktobro 1941), la poetino, perdinte la lastan esperon kaj volon pluvivi, la 31-an de aŭgusto 1941 mortigis sin. La 2-an de septembro ŝi estis entombigita en la loka tombejo.



Post vizito de la tombo de la poetino kaj la domo, kiu estis ŝia lasta loĝejo, mi verkis tiun ĉi poemon en Esperanto kaj en la rusa lingvo:

Al Marina Cvetajeva

* * *

Mi venis ĉi tien, al fora urbeto[1] –
Pri tempoj pasintaj aŭtenta
memor'.
Mi venis al vi, plej amata poeto…
Marina, Marina, rusia dolor'!

Mi staras sur sojlo de dom'
via traba –
La lasta haltejo ĉe flug' via sor.
Vin murdis ĉi tie Destin' –

Марине Цветаевой

* * *

Иду по Елабуге памятным летом,
С погоста по улице берега вдоль.
Пришла я сюда на свиданье с Поэтом…
Марина, Марина, ты – русская боль!

Стою я в сенях, где *тот* гвоздь был
так прочен,
Что смог оборвать твоей жизни юдоль.
Тебя погубил Чёрный ворон –
страж ночи…

[1] Temas pri la malnova rusia urbo Jelabuga, kie la evakuita Marina Cvetajeva loĝis kaj pereis en aŭgusto 1941.

birdo raba…
Marina, Marina, rusia dolor’!

Toleris vi ĉiam teruran malbonon,
Sed sen via cigno fincedis la kor’.
Kaj laste vi kantis cigninan
kanzonon…
Marina, Marina, rusia dolor’!

Rigardas mi supren de bordo
rivera:
Du blankaj animoj en vasta altfor’
Etendis flugilojn en danco tenera...
Marina, Marina, rusia dolor’!

Марина, Марина, ты – русская боль!

Стерпела ты всё в беспощадных лет
бездне,
Но сгинул твой лебедь, твой белый
король.
И спела ты здесь лебединую песню…
Марина, Марина, ты – русская боль!

Смотрю я на небо, и в синем просторе
Я вижу двух птиц силуэт над собой.
Теперь не страшны им разлука и горе…
Марина, Марина, ты – русская боль!

Apud la tombo de la poetino situas tabulo kun ŝia poemo, kiun ŝi verkis en juneco kaj per kiu Marina Cvetajeva eterne parolas nun kun ni, ŝiaj legantoj kaj adorantoj:

Vi iras, kun mi identa,
Celante rigardon sob.
Mi estis sammalatenta!
Iranto nun preter, stop!

En man’ kun buked’ kombina –
Papavoj kun kampanul’ –
La nomon legu – Marina –
Kaj aĝon sur la tabul’.

Ne pensu, ke vi ĉe tombo,
El kiu leviĝos mi...
Mi ŝatis ridi pri sombro
De la makabra mani’!

Kaj sango fluis al vangoj,
Kaj krispis da bukloj op’...
Mi ankaŭ *estis*, vivantoj!
Irantoj nun preter, stop!

Plukadu por vi dum vago
La tigojn kun ruĝa ber’, –
Ne estas pli dolĉa frago
Ol sur la tombeja ter’.

Ne staru en trist-humoro
Kun la funebra kapklin’,
Serene pri mi memoru,
Serene forgesu min.

Jen striojn la suno sternas!
Vi tuta – en ora sfer’...
Ĉu vin ne troe konsternas
Nun mia voĉ’ elsub ter’?

1913



Versaĵoj de Marina Cvetajeva

1. Tradukoj de Ludmila Novikova, 1993-2017

* * *

Красною кистью
Рябина зажглась.
Падали листья,
Я родилась.

Спорили сотни
Колоколов.
День был субботний:
Иоанн Богослов.

Мне и доныне
Хочется грызть
Жаркой рябины
Горькую кисть.

* * *

Sorpo ruĝberis
Tra folirond'.
Tiam aperis
Mi en la mond'.

Cent sonorbatoj –
Brua prolog'.
Estis sabato:
Johan' Teolog'.

Mi nunejara
Revas pri ronĝ'
De ar' amara
Da sorpa ruĝ'.

1916

* * *

Моим стихам, написанным так рано,
Что и не знала я, что я – поэт,
Сорвавшимся, как брызги из фонтана,
Как искры из ракет,

Ворвавшимся, как маленькие черти,
В святилище, где сон и фимиам,
Моим стихам о юности и смерти
– Нечитанным стихам! –

Разбросанным в пыли по магазинам
(Где их никто не брал и не берёт!),
Моим стихам, как драгоценным винам,
Настанет свой черёд.

* * *

Por miaj versoj elsub juna mano,
Kiam ne sciis mi, ke mi – poet',
Ŝprucintaj kiel gutoj el fontano,
Fajreroj el raket',

Kiuj enkuris, kiel diablidoj,
En la sanktejon kun incensa fum',
Por miaj versoj – nelegitaj idoj –
Pri jun' kaj mort' sentum',

Kuŝantaj vane en vendej-vitrinoj
(Apenaŭ disvendebla polva var'!),
Por miaj versoj kiel por kar-vinoj
Ekestos ties jar'.

1913

* * *

Вот опять окно,
Где опять не спят.
Может – пьют вино,
Может – так сидят.
Или просто – рук
Не разнимут двое.
В каждом доме, друг,
Есть окно такое.

Крик разлук и встреч –
Ты, окно в ночи!
Может – сотни свеч,
Может – три свечи…
Нет и нет уму
Моему – покоя.
И в моём дому
Завелось такое.

Помолись, дружок, за бессонный дом,
За окно с огнём!

* * *

Jen fenestra sin',
Kie mankas dorm'.
Eble fluas vin',
Eble sonas plor'.
Eble hom' kun hom'
Ne disigas manojn.
Havas ĉiu dom'
Le fenestrojn samajn.

Vi, en nokt' lumet', –
Estas kora kri'!
Da kandeloj cent',
Eble nur la tri...
Ankaŭ mia mens'
Estas en malnormo.
Flu' de pens' post pens'
Portas al sendormo.

Preĝu do, amik', por la sendormum',
Por fenestra lum'!

1916

ПИСЬМО

Осыпались листья над Вашей могилой,
И пахнет зимой.
Послушайте, мёртвый, послушайте, милый:
Вы всё-таки мой!

Смеётесь! – В блаженной крылатке дорожной!
Луна высока.
Мой – так несомненно и так непреложно,
Как эта рука.

Опять с узелком подойду утром рано
К больничным дверям.
Вы просто уехали в жаркие страны,
К великим морям.

LETERO

Jam kuŝas folioj sur Via tomb-plato,
Odor' de aŭtun'.
Aŭskultu, mortinto, aŭskultu, amato:
Vi mias ĝis nun!

Vi ridas! – En ĉarma vojaĝa survesto!
Sub luna fontan'.
Vi mias – sen dubo, sen ajna kontesto,
Samkiel ĉi man'.

Denove mi venos en tempo fruhora
Al la kuracej'.
Vi nur forveturis al lando plej fora,
Al mar' granda plej.

Я Вас целовала! Я Вам колдовала!
Смеюсь над загробною тьмой!
Я смерти не верю! Я жду Вас
с вокзала –
Домой.

Пусть листья осыпались, смыты
и стерты
На траурных лентах слова.
И, если для целого мира Вы мёртвый, –
Я тоже мертва.

Я вижу, я чувствую, – чую Вас всюду!
– Что ленты от Ваших венков! –
Я Вас не забыла и Вас не забуду
Во веки веков!

Таких обещаний я знаю бесцельность,
Я знаю тщету.
– Письмо в бесконечность. – Письмо
в беспредельность –
Письмо в пустоту.

Mi same vin kisas! Amsorĉon
samsendas!
Mi ridas pri l’ tomba malhel’!
Mi l’ morton ne kredas, Vin ĉiam
atendas
Al hejm’!

Defalis folioj, paliĝis la vortoj
Sur fac’ de l’ funebra ŝtofstri’.
Kaj se por la mondo Vi estas
en morto, –
En mort’ estas mi.

Mi vidas, mi sentas, mi flaras Vin
ĉie!
Ne gravas rubandoj de l’ kron’!
Mi vin ne forgesis, forgesos nenie,
Eternos memor’!

Mi scias de tiaj promesoj sencelon,
Mi scias pri van’.
– Letero nenien. – Leter’ en ĉielon –
Al kosma lontan’.

1914

* * *

Уж сколько их упало в эту бездну,
Разверзтую вдали!
Настанет день, когда и я исчезну
С поверхности земли.

Застынет всё, что пело и боролось,
Сияло и рвалось.
И зелень глаз моих, и нежный голос,
И золото волос.

И будет жизнь с ее насущным хлебом,
С забывчивостью дня.
И будет всё – как будто бы под небом
И не было меня!

* * *

Sennombre onin glutis porĉiame
La truo de l’ etern’!
En iu tag’ mi malaperos same
De l’ faco de la ter’.

Rigidos la kantanto plenespera
Kun brilo kaj amar’,
Kun verdo de l’ rigard’, kaj voĉ’
tenera,
Kaj oro de l’ harar’.

Kaj daŭros vivo laŭ kutima relo
En taga rotaci’.
Kaj daŭros ĉio, kvazaŭ sub ĉielo
Neniam estis mi!

Изменчивой, как дети, в каждой мине,
И так недолго злой,
Любившей час, когда дрова в камине
Становятся золой.

Виолончель, и кавалькады в чаще,
И колокол в селе…
– Меня, такой живой и настоящей
На ласковой земле!

К вам всем – что мне, ни в чем не знавшей меры,
Чужие и свои?!-
Я обращаюсь с требованьем веры
И с просьбой о любви.

За то, что мне прямая неизбежность –
Прощение обид,
За всю мою безудержную нежность
И слишком гордый вид,

За быстроту стремительных событий,
За правду, за игру…
– Послушайте! – Ещё меня любите
За то, что я умру.

Infannaiva kaj diversmiena
Kaj tute sen malam',
Ŝatanta, kiam la lignaĵ' kamena
Cindriĝas grize jam.

Violonĉel', promeno surĉevala,
Sonoroj dum vesper'...
Mi, kiu estis tia vivreala
Sur la karesa ter'!

Al ĉiuj vi – por mi, natur' sen brido,
Parencas ĉiuj jam –
Mi turnas min kun la postul' de fido
Kaj peto pri la am'.

Pro l' destinita por mi vivo-karmo –
Pardon' de ĉiu pek',
Pro la inund' de mia milda ĉarmo
Kaj pro l' fieraspekt',

Pro l' rapidec' de l' nuna historio,
Pro ver' kaj ver-imit'...
Aŭskultu do! Vi amu min pro tio,
Ke mortos iam mi.

1913

Б. Пастернаку

Рас-стояние: вёрсты, мили…
Нас рас-ставили, рас-садили,
Чтобы тихо себя вели
По двум разным концам земли.

Рас-стояние: вёрсты, дали…
Нас расклеили, распаяли,
В две руки развели, распяв,
И не знали, что это – сплав

Вдохновений и сухожилий…
Не рассо́рили – рассори́ли,

Al B. Pasternak

Inter ni nun distanc', dis-stanco...
Oni igis nin al dis-transo,
Por ke regu nin mut-silent'
En du randoj de l' kontinent'.

Ho, dis-tranĉ': ni pro l' verstoj mutas...
Disgluitas ni nun, dislutas,
Ni – du brakoj de la diskruc',
Krucumitas ni sen akuz'.

Oni nian kunon disfendis,
Ne distordis nin, sed disperdis,

Расслоили…
Стена да ров.
Расселили нас, как орлов-

Заговорщиков: вёрсты, дали…
Не расстроили – растеряли.
По трущобам земных широт
Рассовали нас, как сирот.

Который уж, ну который – март?!
Разбили нас – как колоду карт!

Disdispersis...
Jen mur' kaj kav'.
Oni ŝiris nin per enklav' –

(Konspirantoj-agloj, ni regis) –
Ne disigis nin, sed dissegis.
En nestaĉojn de la homar'
Disŝovitas ni – orfa par'.

Jen plura jam, ho kioma – mart'?
Dismetitas ni po ludkart'.

1925

* * *

Тоска по родине! Давно
Разоблаченная морока!
Мне совершенно все равно –
Где совершенно одинокой

Быть, по каким камням домой
Брести с кошелкою базарной
В дом, и не знающий, что – мой,
Как госпиталь или казарма.

Мне все равно, каких среди
Лиц ощетиниваться пленным
Львом, из какой людской среды
Быть вытесненной – непременно –

В себя, в единоличье чувств.
Камчатским медведём без льдины
Где не ужиться (и не тщусь!),
Где унижаться – мне едино.

Не обольщусь и языком
Родным, его призывом млечным.
Мне безразлично – на каком
Не понимаемой быть встречным!

(Читателем, газетных тонн
Глотателем, доильцем сплетен...)
Двадцатого столетья – он,
А я – до всякого столетья!

* * *

La patra tero! Nostalgi'!
Senmaskigita miskonsolo!
Ĉar samegalas ja por mi –
En kiu lok' en plena solo

Mi estu, kaj sur kiu voj'
Min trenu kun bazara sako
Al dom' sen scio pri hejmĝoj',
Samkiel hospital-barako.

Ĉar samegalas, kiu kaĝ'
Hirtigu min, kaptit-leonon,
Kaj kiu homamasa kraĉ'
Forpelu – fojon milionan –

Min al soleca sinkompren'.
Nordurso sen glacia peco,
Mi ne elvivos (vanas pen'!),
Kaj kie – kia diferenco?!

Ne helpos lingvo de l' patri'
Kun ĝia altirforto fata.
En ajna lingvo same mi
Nenie estas komprenata!

(De la legant' – de l' gazetar'
Glutant', melkant' de la malpuro…)
En la dudeka li centjar',
Sed mi ja – ekster tempmezuro!

Остолбеневши, как бревно,
Оставшееся от аллеи,
Мне все – равны, мне всё – равно,
И, может быть, всего равнее –

Роднее бывшее – всего.
Все признаки с меня, все меты,
Все даты – как рукой сняло:
Душа, родившаяся – где-то.

Так край меня не уберег
Мой, что и самый зоркий сыщик
Вдоль всей души, всей – поперек!
Родимого пятна не сыщет!

Всяк дом мне чужд, всяк храм мне пуст,
И все – равно, и все – едино.
Но если по дороге – куст
Встает, особенно – рябина...

La trunk' senviviĝinta kaj
Restinta en la lok' dezerta,
Al ĉiu ajn, al ĉio ajn
Mi estas samindeferenta.

Kaj pleje – al la pasintec',
Ne turmentanta nostalgie.
La signoj, datoj – en forges':
L' animo, naskiĝinta ie.

Jen kiel ja ne gardis min
La patroter', ke esplorulo
Ne trovos en la tutanim'
Eĉ spuron de denask-makulo!

Samfremdas ĉiu hejmo, templ'
Kaj samegalas ajnaj sortoj.
Sed se arbust' de temp' al temp'
Troviĝas – kun helruĝaj sorpoj...

1934

* * *

Знаю, умру на заре! На которой из двух,
Вместе с которой из двух – не решить по заказу!
Ах, если б можно, чтоб дважды мой факел потух!
Чтоб на вечерней заре и на утренней сразу!

Пляшущим шагом прошла по земле! – Неба дочь!
С полным передником роз! – Ни ростка не наруша!
Знаю, умру на заре. – Ястребиную ночь
Бог не пошлёт на мою лебединую душу!

* * *

Mortos mi dum ĉielruĝo! Dum kiu el du,
Kune kun kiu el du – ĉu vespere, matene?
Se estinĝiĝus mi ĝuste laŭ ĉi ambigu' –
Dum sunsubiro kaj suna leviĝo samvene!

Dance paŝante, mi iris sur ter'! Ĉiel-id'!
Kun plentuko da rozoj! Senvelka karmino!
Mortos mi ĉe la aŭror'. – Nokton de raba bird'
Dio ne sendos ja por mia cigna animo!

Kaj flankiginte sen kis' krucifikson

Нежной рукой отведя нецелованный крест,
В щедрое небо рванусь за последним приветом.
Прорез зари – и ответной улыбки прорез…
Я и в предсмертной икоте останусь поэтом!

kun Fil’,
Alton bonvenan mi soros por lasta kvieto.
Bril’ de aŭror’ – kaj de mia rideto rebril’…
Mi en ĉemorta singulto restados poeto!

1920

2. Tradukoj de Tatjana Auderskaja (Ukrainio), 2017 (krom “Versoj por Ĉeĥio” – 2002)

Я знаю правду! Все прежние правды – прочь!..

Я знаю правду! Все прежние правды – прочь!
Не надо людям с людьми на земле бороться.
Смотрите: вечер, смотрите: уж скоро ночь.
О чём – поэты, любовники, полководцы?

Уж ветер стелется, уже земля в росе,
Уж скоро звёздная в небе застынет вьюга,
И под землёю скоро уснём мы все,
Кто на земле не давали уснуть друг другу.

Mi scias la veron! Antaŭajn verojn – for!..

Mi scias la veron! Antaŭajn verojn – for!
Ne devas okazi de homo kun hom’ bataloj.
Rigardu: vespero, baldaŭ la nokta hor’.
Pri kio – poetoj, amantoj kaj generaloj?

Jam vent’ susuras, jam rosojn sternas juni’,
Jen venas stela blizard’ en ĉielon glacian,
Kaj sub la tero baldaŭ ekdormos ni,
Ĉiuj, kiuj surtere ne lasis endormi unu l’ alian.

1915

Из строгого, стройного храма…

Из строгого, стройного храма
Ты вышла на визг площадей…
– Свобода! – Прекрасная Дама
Маркизов и русских князей.

Свершается страшная спевка, –
Обедня ещё впереди!

El templo severe aspekta…

El templo severe aspekta
Vi venis al placa tumult’...
– Libero! – la Damo Perfekta,
De ĉiaj nobluloj belkult’.

Okazas terura kunkanto, –
Anstataŭ la meso – milit’!

– Свобода! – Гулящая девка
На шалой солдатской груди!

– Libero! – putin’ provokanta
Sur brust’ de ebria bandit’!

1917

Где лебеди? – А лебеди ушли...

– Где лебеди? – А лебеди ушли.
– А во́роны? – А во́роны – остались.
– Куда ушли? – Куда и журавли.
– Зачем ушли? – Чтоб крылья
не достались.

– А папа где? – Спи, спи, за нами Сон,
Сон на степном коне сейчас приедет.
– Куда возьмёт? – На лебединый Дон.
Там у меня – ты знаешь? –
белый лебедь…

Kie la cignoj? – Ili iris for...

– Kie la cignoj? – Ili iris for.
– Kaj korvoj? – Ilin ni plu devos
havi.
– Kien la cignoj iris? – Flugis sor.
– Por kio? – Por flugilojn blankajn
savi.

– Kaj kie paĉjo? – Dormu sub ikon’,
Tuj la ĉeval’ mirakla sonĝon trenos.
– Kien veturos ni? – Al cigna Don’,
Al blanka cigno mia ni alvenos...

1918

Плохо сильным и богатым…

Плохо сильным и богатым,
Тяжко барскому плечу.
А вот я перед солдатом
Светлых глаз не опущу.

Город буйствует и стонет,
В винном облаке – луна.
А меня никто не тронет:
Я надменна и бедна.

Ve al vi, aristokratoj…

Ve al vi, aristokratoj,
La riĉuloj – en deprim’.
Sed mi antaŭ la soldatoj
Ne kliniĝos pro ektim’.

L’ urbo ĝemas kaj rabias,
Lun’ – en vina atmosfer’.
Sed plebanojn mi defias,
Mi, fiera en mizer’.

1917

О слёзы на глазах!..

Из цикла “К Чехии” (“Март”), стихотворение 8

О слёзы на глазах!
Плач гнева и любви!
О Чехия в слезах!
Испания в крови!

L’ animo en dolor’!..

El la ciklo “Versoj por Ĉeĥio” (“Marto”), la versĵo n-ro 8

L’ animo en dolor’!
Kolero pro la am’!
Ĉeĥio en la plor’!
Madrido en la flam’!

О чёрная гора,
Затмившая – весь свет!
Пора – пора – пора
Творцу вернуть билет.

Отказываюсь – быть.
В Бедламе нелюдей
Отказываюсь – жить.
С волками площадей

Отказываюсь – выть.
С акулами равнин
Отказываюсь плыть –
Вниз – по теченью спин.

Не надо мне ни дыр
Ушных, ни вещих глаз.
На твой безумный мир
Ответ один – отказ.

Minacas nigra mont’
Al hela mond’ per blind’!
Redonu mi pro hont’
Bileton de l’ Kreint’.

Mi negas je ekzist’:
En la malhoma get’
Plu vivi sen rezist’,
Kun lupa raba best’

Kunhurli en la hord’,
Kun ŝarka kamaril’
Kunflosi preter bord’–
Malsupren – kun humil’.

Mi ne bezonas tru-
ojn por aŭd-vida uz’.
Al monda plendetru’
Respondo nur – rifuz’!

1939

Мракобесие. – Смерч. – Содом...

Мракобесие. – Смерч. – Содом.
Берегите Гнездо и Дом.
Долг и Верность спустив с цепи,
Человек молодой – не спи!
В воротáх, как Благая Весть,
Белым стражем да встанет – Честь.

Обведите свой дом – межой,
Да не вни́дет в него – Чужой.
Берегите от злобы волн
Садик сына и дедов холм.
Под ударами злой судьбы –
Выше – пра́дедовы дубы!

Obskurad’. – Uragan’. – Sodom’…

Obskurad’. – Uragan’. – Sodom’.
Gardu Neston en via Dom’!
Fideleco kaj nobla Dev’
Sentinelu por via serv’.
Dio regu en via kor’,
Blanka gardo por vi – l’ Honor’!

Estu via domnest’ – insul’,
Ke ne venu al ĝi – Fremdul’.
Tomb’ de avo, ĝarden’ de fil’ –
Savu ilin en la azil’!
Altu spite al misa sort’ –
Kverk’ prapatra en via kort’!

1918

С. Э.[1]

Я с вызовом ношу его кольцо
– Да, в Вечности – жена, не на бумаге. –
Его чрезмерно узкое лицо
Подобно шпаге.

Безмолвен рот его, углами вниз,
Мучительно-великолепны брови.
В его лице трагически слились
Две древних крови.

Он тонок первой тонкостью ветвей.
Его глаза – прекрасно-бесполезны! –
Под крыльями раскинутых бровей –
Две бездны.

В его лице я рыцарству верна.
– Всем вам, кто жил и умирал без страху.–
Такие – в роковые времена –
Слагают стансы – и идут на плаху.

S. E.[2]

Mi portas lian ringon kun fier'!
– En Eternec' – l' edzin', ne por parado! –
Lia vizaĝ' kun akra karakter' –
Kiel la spado.

Senvortas lia buŝ', dolora ark',
Tragike konkavitas liaj vangoj.
Defie montras sin nobleca mark' –
Du praaj sangoj.

Li sveltas per sveltec' de juna kan'.
Kiel abismoj logas la okuloj! –
Sub brovoj – la flugiloj en elan' –
Du bluoj.

Li – kavalir', fidela mi vasal',
– Al ĉiuj, kiuj morton ne evitas! –
Similaj – en la tempoj de fatal'–
Poemojn verkas – eŝafodojn spitas.

1914

Кто уцелел – умрёт, кто мёртв – воспрянет...

Из цикла "Дон", стихотворение 2

Кто уцелел – умрёт, кто мёртв – воспрянет.
И вот потомки, вспомнив старину:
– Где были *вы*? – Вопрос как громом грянет,
Ответ как громом грянет: – На Дону!

– Что делали? – Да принимали муки,
Потом устали и легли на сон.
И в словаре задумчивые внуки
За словом: долг напишут слово: Дон.

1918

Mortint' – revivos kaj vivinto – mortos...

El la ciklo "Don'", versaĵo n-ro 2

Mortint' – revivos kaj vivinto – mortos.
Kaj iam en futura lecion':
– "Kie *vi* estis?" – la demando tondros,
Kaj ektondregos la respond': "Ĉe Don'!".

– "Kion vi faris?" – "Staris ni martire,
Laciĝis kaj endormis post opon'".
Kaj en vortar' enskribos nep' admire
Post vorto "Dev'" fieran vorton "Don'".

---

[1] С.Э. – Сергей Эфрон, муж М. Цветаевой
[2] S.E. – Sergeo Efron, la edzo de M. Cvetajeva

Al la 200-jara jubileo de la poeto

Aleksej Konstantoviĉ Tolstoj (1817-1875)

VERSAĴOJ

tradukis Klara Ilutoviĉ (Elektrostalj)

***

Коль любить, так без рассудку,
Коль грозить, так не на шутку,
Коль ругнуть, так сгоряча,
Коль рубнуть, так уж сплеча!

Коли спорить, так уж смело,
Коль карать, так уж за дело,
Коль простить, так всей душой,
Коли пир, так пир горой!

***

Amu sen prudentopremo,
Kaj minacu sen ŝercemo,
Haku je svingega bat',
Kaj insultu sen kompat'!

Punu juste, laŭmerite,
Kaj disputu senhezite,
Festjubilu je furor',
Kaj pardonu el la kor'.

***

Острою секирой ранена береза,
По коре сребристой покатились слезы.
Ты не плачь, береза, бедная, не сетуй!
Рана не смертельна, вылечится к лету,
Будешь красоваться, листьями убрана...
Лишь больное сердце не залечит раны!

***

Per hakilo akra la betul' vunditas,
Laŭ la ŝel' arĝenta ĝiaj larmoj glitas.
Vi, betul', ne ploru vane, sen espero!
Estos kuracita l' vundo al somero,
Via foliara belo ree gracos...
Nur malsana koro vundojn ne kuracos!

***

Дробится, и плещет, и брызжет волна
Мне в очи соленою влагой;
Недвижно на камне сижу я – полна
Душа безотчетной отвагой.

Валы за валами, прибой и отбой,
И пена их гребни покрыла;
О море, кого же мне вызвать на бой,
Изведать воскресшие силы?

Почуяло сердце, что жизнь хороша,
Вы, волны, размыкали горе,

***

Eriĝas, kaj ŝprucas, kaj plaŭdas l' ondar'
Salakve al mia vizaĝo.
Senmove sur ŝtono mi sidas – la mar'
Plenigas je l' svaga kuraĝo.

Ondeg' post ondego, alfluo, forflu',
Ŝaŭmad' ondokreste, flu-tordoj.
Ho, kiun defii por sperti en bru'
Batala retrovon de l' fortoj?

La koro eksentis vivbonon sen lim',
La dramon forpelis l' ondaro.

От грома и плеска проснулась душа,
Сродни ей шумящее море!

Pro l’ tondr’ ondokura vekiĝis l’ anim’
Alude al bruo de l’ maro!

***

Не пенится море, не плещет волна,
Деревья листами не двинут,
На глади прозрачной царит тишина,
Как в зеркале мир опрокинут.

Ne ŝaŭmas la maro, ne plaŭdas la ond’,
Ne tuŝas foliojn venteto.
En la marseren’ speguliĝas la mond’,
Radias la mar’ je kvieto.

Сижу я на камне, висят облака
Недвижные в синем просторе;
Душа безмятежна, душа глубока,
Сродни ей спокойное море.

Mi sidas sur ŝtono. Senmovas nubar’
En blua vastaĵ’ la ĉiela.
Senzorgas, profundas l’ anim’, kiel mar’
La milda, sen bru’, pace hela.

Miĥail Jemcev, Jeremej Parnov

REVENIGU LA AMON [1]

La 6-a de aŭgusto. Kabineto de kuracistoj.

La ĉefkuracisto, flue trarigardinte konkludon de la dermatologo, ŝovis la paperon en sian jakpoŝon. Sulkiĝante kvazaŭ pro doloro, li demetis la okulvitrojn, zorgeme viŝis ilin per ŝampeco kaj komencis masaĝi ruĝajn kavetojn sur la nazradiko.

– Ĉu vi certas, ke tio estas eritemo? – demandis li Tavolsky-n.

– Sendube, – kapjesis tiu. – La dermatologo opinias same. Li supozas, ke la haŭto humidiĝos.

– Malbone.

Tavolsky tiris la ŝultrojn.

– Punkciu la brustoston kaj poiomete komencu prepari lin al la transplantado. Malaperis la lasta espero. Agrablaj surprizoj ne okazos... Kion pri la sango?

– Komenciĝis malboniĝo.

La ĉefkuracisto ekkapjesis, kvazaŭ lin tre ĝojigis tio, kion rakontis Tavolsky.

– La monocitoj kaj retikulacitoj malamasiĝas. Pliamasiĝis la ŝvelintaj palaj ĉeloj...

– Eblas tokseca granulado de neŭtrofiloj, – interrompis lin la ĉefkuracisto.

– Jes. Ni jam prepariĝas.

– Kion pri la leŭkocitoj?

– Malmultiĝas. Tamen esence pli malrapide, ol ni povus supozi en tia situacio. Cowen konsilas antaŭ la transplantado efektivigi plenan transfuzon de la sango.

– Estu tiel. Li ja pli kompetentas. Kion li pensas koncerne la staton de la leŭkocitoj?

---

[1] Fino. La komencon vidu en REGo, num. 2 (99)

– Li opinias, ke la procezo mem ne estas tro danĝera, sed tio ne donas iujn ajn kaŭzojn por optimismo, – mokis Tavolsky.

– Tion ni mem scias, – kolere mansvingis la ĉefkuracisto. – Kion li diras krome?

Tavolsky denove tiris la ŝultrojn kaj, pafĵetinte cigaretrestaĵon en la lavujon, komencis prisuĉi brulvunditan fingron.

*La 7-a de aŭgusto 19**. Nokto. Temperaturo – 37. Pulso – 88. Sangopremo – 120/75. Rim.: la kvanto de leŭkocitoj malpliiĝis ĝis 800.*

Por ne endormiĝi flegistino Beata Travatti promenis tra la koridoro. La vitraj pordoj de la ĉambroj similis al nigraj truoj. Beata elmetis kesteton kun kafo, bruligis alkoholfajrilon. En senombra lumo la eta siringa fajrolangeto estis apenaŭ rimarkebla. La verda ĥalato kun emblemo de la medicina personaro ŝajnis al ŝi pli lazura. Ŝi elmetis speguleton, sed la malhelaj, preskaŭ nigraj lipoj provokis nur malkontentan grimacon. La senombra lumo incitis ŝin. Ĝi estingis ĉiujn gajajn kolorojn kaj sendube maljunigis. Beata premis la butonon, kaj malvarma flamo sub la plafono, konvulsie ektreminte, estingiĝis. La nigraj profundegoj de la pordoj iĝis griznuancaj. Tra la maldikaj eŭrlonaj kurtenoj ekvideblis la fenestroj. Komenciĝis la aŭroro. Beata deflankigis kurtenon kaj premis sin al la malvarma vitro. Sed tio, kion ŝi ekvidis en la antaŭaŭrora malhelo, instigis ŝin ekkrieti kaj impeti al la ĉambro de Barton.

La 7-a de aŭgusto. Kabineto de kuracistoj.

Telefonsonoro de Tavolsky vekis la deĵoran kuraciston. Tiu ne tuj povis rekonsciiĝi kaj stulte ekkuris en la ĉambro. La koro batis kvazaŭ malbone instalita motoro. Finfine li trovis palpe la aŭskultilon kaj, lekante siajn sekajn lipojn, flustris ion.

Tavolsky. Halo! Kio okazis? Ĉu estas vi, Tonny?

La deĵora kuracisto. Eyb? Ĉu vi freneziĝis? Telefoni tiom malfrue...

Tavolsky. Ĉu vi dormas?

La deĵora kuracisto. Mi? Certe ne... Sed kial vi ne dormas, ja vi ne deĵoras nun?

Tavolsky. Mi ial ne povas endormiĝi. Kion pri lia stato, Tonny? Ja hodiaŭ okazos la operacio...

La deĵora kuracisto. Ĝuste tial vi devus ripozi... Ĉio pasas sen ŝanĝoj. Li dormas. La temperaturo restas sur la sama nivelo. Supozeble, pli proksime al la mateno ĝi iom falos. Iru dormi, Eyb!

La deĵora kuracisto intencis remeti la aŭskultilon, sed subite larĝe malfermiĝis la pordo, kaj en la ĉambron enkuris flegistino Beata. La aŭskultilo ĵetiĝis sur la telefonon. La deĵora kuracisto salte stariĝis, renversinte la surtablan lampon. Vortoj forestis, kvazaŭ en muta filmo. Ili elkuris en la koridoron. En ĝia kontraŭa ekstremo aperis blanka figuro. Paŝoj ne aŭdeblis, kvazaŭ ili vidus fantomon. Kiam la okuloj adaptiĝis al la duonhelo, la deĵora kuracisto sukcesis distingi, ke tra la koridoro certpaŝe kaj nerapide iras Allan Barton. Liaj okuloj estis larĝe

malfermitaj kaj ek-ekbrilis en la flamo de la alkoholfajrilo. Barton singarde malfermis la pordon de sia ĉambro, kaj la koridoro iĝis malplena.

La 7-a de aŭgusto. Post unu horo. Kabineto de kuracistoj.

Tavolsky alkuris kun pantofloj surpiede. Nun li aspektis en la oficira uniformo eĉ pli kurioze, ol kutime. Li ofte ŝultrumis kaj, kliniĝante, diligente frotetis siajn manplatojn. Ŝajnis, ke li terure malvarmiĝas. La ĉefkuracisto, ne demetante kuŝantan sur la ŝultroj militpalton, per larĝaj paŝoj mezuris la ĉambron. La deĵoran kuraciston tuj oni forpelis en la koridoron. Penante konservi sendependan mienon, li fingrotamburis sur la fenestro kaj eĉ provis fajfeti ion. Flegistino Beata sensone ploris, metinte la vizaĝon en la malsekiĝintan verdan tuketon.

– Tamen ekspliku al mi, majoro Tavolsky, kial vi, lia kuracisto, tiom malatente tralegis la anamnezion?!

Tavolsky silentis. Se la ĉefkuracisto ekparolis per tia tono, respondi ne endis. Egale li aŭskultus neniujn pravigojn kaj eksplikojn. Kaj kion entute oni povus respondi?

– Certe, mi komprenas, ke la rentgena lezo estas siaspeca kazo, ĝi tute ne dependas de la antaŭa stato... Sed samtia siaspeca kazo estas ankaŭ ostorompo, elartikiĝo, akutiĝo de apendico, finfine. Sed en ĉiuj similaj kazoj, escepte la plej urĝajn, ni tamen komencas terapion nur post konatiĝo kun la anamnezo. Ja mi pravas, ĉu ne? Kial do vi, spertega kuracisto, eĉ ne tuŝis la malsanhistorion, kie tute klare estas indikite, ke Allan Barton de la infanaĝo suferas somnambulismon? Kial? Respondu, majoro, kial?

Tavolsky silentis.

La ĉefkuracisto ĵetis sian militpalton sur la plankon. Li sidiĝis en la fotelon, sed tuj stariĝis kaj denove ekmarŝis tra la ĉambro.

– Tiu promeno mortigos lin, ĉu vi komprenas? Precipe nun, antaŭ la operacio, kiam aperis sufiĉe realaj ŝancoj por sukceso!

Subite li eksilentis. Sed daŭre, kvazaŭ jaguaro en kaĝo, ĵetadis sin tien-reen. La surtabla lampo ĝis nun kuŝis sur la planko. Pala, malsanema aŭroro penetradis en la ĉambron, kie preskaŭ senmove pendis bluetaj nuboj de la tabaka fumo. Peza silento dolorige premis miringojn.

Finfine la ĉefkuracisto sidiĝis. Li incitite levis la lampon kaj ŝaltis ĝin. Tavolsky duonfermis la okulojn, sed postmomente malfermis ilin.

– Senprokraste determinu, kie konkrete li estis, – seke kaj trankvile ordonis la ĉefkuracisto. – Ĝis tiu momento ni entreprenu nenion. Ĉu vi komprenas?

– Jes... Tamen... kiel ekscii? Ja somnambuloj kutime nenion memoras poste.

– Kutime? Sed li ne estas kutima somnambulo. Li estas radiaktiva somnambulo, kiu ĉie lasas sian spuron... Ĉu vi komprenis finfine?

Tavolsky sopiranime konsciis, ke la ĉefkuracisto mokturmentas lin, ke ne endus permesi paroli rilate al si tiatone. Sed la estro estis prava, tutsence prava, kaj Tavolsky silentis.

– Telefonu al la gardistoj, ili senprokraste sendu soldaton kun Geiger-kalkulilo. Trakontrolu la tutan vojon... Poste raportu.

Tavolsky etendis la manon al la telefono, sed la ĉefkuracisto per neglekta gesto haltigis lin:

– Telefonu en la koridoro. Mi devas paroli kun iu.

Tavolsky hasteme stariĝis kaj, iom kliniĝinte, ekplandis al la pordo. La ĉefkuracisto rigardis tiun kurbiĝintan dorson, la elokventan dorson de la laca grandaĝulo, kaj kompato tranĉe tuŝis lian koron.

– Enbuŝigu iun trankviligan tablojdon, Eyb, kaj... iru hejmen. Kun la dozmezuristo iru doktoro Weisz.

*La 7-a de aŭgusto 19**. Kapitano pri medicina servo Toni Weisz.*

La dozmezuristo tuj trovis la spuron, kaj ni sufiĉe certe ekiris antaŭen. Barton konstante sinuis, kvazaŭ cirkaŭante nevideblajn barojn. La subkonscio de somnambuloj neniam dormas. Ĝuste tial iliaj reagoj al la ekstera medio estas pli certmovaj kaj rapidaj, ol en ordinaraj kondiĉoj. Nur tio eksplikas, kiamaniere Barton sukcesis trairi la tutan pafkampon tien kaj reen nerimarkita.

Li preteriris la golfokampon, ascendis la betonan ponteton trans la naĝbaseno kaj krute turnis sin al la rozujo. Ne atinginte la kvaran sektoron, li denove deflankiĝis kaj direktis sin al kontraŭsituanta hangaro. Poste li transgrimpis la barilon kaj atingis la hangartegmenton laŭ stango. Per tiu komplika kaj senorda vojo li venis al ŝoseo de la sepa sektoro. Sur la vojon li trafis descendinte desur la arbo, poste preter la kazino trairis al radaraj turoj kaj, penetrinte en la teritorion de la radiostacio, laŭ la plej kurta vojo eliris al plugita zono ĉirkaŭ la nula sektoro. La dratbarilon li transgrimpis tute proksime de la dua turo. La gardisto, verŝajne, ne rimarkis lin.

Ĉar en la provkampon oni permesas eniri nur laŭ specialaj legitimiloj, ni estis devigitaj reveni en la sepan sektoron. De tie mi telefonis al la generalo. Li tuj donis enirpermeson. Sufiĉe rapide ni trovis spuron de Barton, kiu kondukis al la biologia parto de la sektoro. La fono konstante plifortiĝis kaj post proksimume cent kvindek – ducent metroj tute surdigis la signalojn de la spuro. Ni denove estis devigitaj reveni kaj peti la gardestron, ke li donu hundon. La gardestro kategorie rifuzis. Li diris, ke li neniam konsentos sendi beston al certa morto. Mi denove telefonis al la generalo, kaj tiu ordonis senprokraste disponigi al ni la hundon. La estro remetis la aŭskultilon, kaj tuj ordonis venigi soldaton kun hundo. La soldato rapide surmetis defendokostumon kaj jam pretis iri kun ni, sed la sentema oficiro ordonis alporti defendokompleton ankaŭ por la hundo. Tio estis absoluta stultaĵo. Tutegale la kapo de la hundo restis neprotektita, alie la hundo ne povus trovi la spuron.

Komence la hundo kondutis sufiĉe senerare, sed, kiam ni eniris la zonon, kie estis testata “La Ŝparema Bess”, ĝi maltrankviliĝis kaj ekhurletis. Verŝajne, la besto sentis ion malbonan. La herbo tie estis tute ekstermita. Nur de loko al loko videblis velkantaj arbustetoj. La hundo sidiĝis kaj, levinte la kapon al la ĉielo, sopirvoĉe ekhurlis. Klopodoj de la soldato formovi la hundon de sur la loko restis senrezultaj. Ĝi reziste apogis sin per ĉiuj kvar kruroj kaj ne ĉesis hurli. Ni estis devigitaj mortpafi la kompatindan beston. Tutegale ĝi estis kondamnita.

Mi prenis binoklon kaj tuj komprenis kien iris Barton. Ĝis la horizonto mem videblis nur putranta stepo. La sola atoma tanko videblis fore. Barton povis iri nur al la tanko – la konkludo estis senduba.

La fono atingis sian maksimumon kaj jam ne plu ŝanĝiĝis. Nur interne de la tanko la radieco abrupte suprensaltis. Influis refoja radieco en la metalo.

Barton rilatis al la projekto "La Ŝparema Bess", tial eble li sciis, ke en la tanko dum la esplorado troviĝis ŝafinoj. Subkonscia impulso venigis lin ĝuste ĉi tien pro la hieraŭa somnambula afekcio. Eblas, laŭ mi, ke la unuan dozon Barton ricevis dum simila nokta vizito, pri kiu kompreneble li, vekiĝinte matene, tute nenion memoris. La detala ekzamenado montris, ke interne de la tanko kaj sur ĝia ekstera kiraso, en lokoj kovritaj per elementorganika lubrikaĵo, ĉie videblas spuroj de nudaj fingroj. Ĉar neniu, krom Barton, dum la periodo, post la provoj, estis endanĝerigita, mi proponas konkludi ke ĝuste li spuris sur la tanko. Tial mankas neceso de daktiloskopia ekspertizo. Specifeco de la fingrospuroj, kiom povas juĝi mi kiel specialisto pri milita kaj kriminala medicino, montras ke ili aperis aŭ tute antaŭnelonge, aŭ antaŭ kelkaj tagoj.

Tio sufiĉe konvinke kredigas, ke la supozo, ke doktoro Barton ricevis la radiadan dozon dum la unua vizito, plej verŝajne estas ĝusta.

La 8-a de aŭgusto. Kabineto de kuracistoj.

La ĉefkuracisto eniris, kiel ĉiam larĝpaŝe. Li demetis sian mantelon, skuis ĝin. La pluva odoro plenigis la ĉambron.

– Strange! – li diris, kapklinante al Tavolsky. – Strange! Kial tiom subite malboniĝis la vetero? Tute subite... Nu, kion pri li?

– Mi decidis ne operacii lin.

– Vi pravas. Nun li estas absolute senespera. Ekde la morgaŭa tago mi permesas narkotaĵojn. Kiel li sentas sin nun?

– Li konstante deliris. Vokis iun virinon. Kriis, ke ŝi loĝas en Medano.

– Temperaturo?

– La sama – tridek sep kaj ses. La sangopremo ankaŭ ne plialtigis. La sangofaktoroj aperos, mi opinias, post iom da tempo.

– Certe. Tamen eĉ sen tio li estas kondamnita. Pli malbone oni ne povus antaŭvidi... Efektive, ne eblas fuĝi de la sorto. Kiu supozus... Kompatindulo! Interalie, Eyb, hodiaŭ matene mi iom koleris, ne ofendiĝu. Kaj krome... La generalo petis sekretigi la okazintaĵon. Ĉu vi komprenas min?

Tavolsky kapjesis.

– Do, bonege. Kun la flegistino mi mem konversacios. Unuvorte, ni interkonsentu: neniun duan dozon li ricevis. Nenio okazis! Kiom li havas nun?

– Kvarcent.

La ĉefkuracisto balancis la kapon:

– La finalo… proksimas. Kion diras Cowen?

– Li dume scias nenion.

– Li ne sciu. Forveturigu lin sub iu konvena preteksto... Cetere, ne: mi mem faru tion.

– Cowen supozas, ke foriĝos la haŭto kaj elfalos la hararo. Necesas almenaŭ iamaniere konservi akvobilancon de la histo. Krome. Malgraŭ ĉio mi volas fari plenan transfuzon de la sango.

La ĉefkuracisto ŝultrumis kaj foriris al la fenestro.

Tavolsky legis pensojn de la estro, kiel malfermitan libron.

“Por kio? Ja egale li estas kondamnita. Vi nur plilongigos liajn suferojn. La malfeliĉa junulo, pro kio la sorto preparis tian elprovon por li? Almenaŭ lasu lin trankvile morti”.

– Se vi insistas, – la ĉefkuracisto emfazis la vorton “insistas”, – mi ne kontraŭas tiujn... entreprenojn.

– Jes, – mallaŭte diris Tavolsky. – Ni efektivigos la transfuzon kaj provos hipotermion.

La ĉefkuracisto nenion respondis kaj ekokupiĝis pri siaj paperoj. Poste per abrupta movo li demetis la okulvitrojn.

– Faru, kion vi opinias necesa. Sed memoru du momentojn... Unue, – li fleksis fingron, – ne transformu vian kompaton en punon por vi mem kaj ankaŭ por li. Due, – li fleksis la duan fingron, – mi oficiale permesas al li narkotaĵojn, alivorte mi agas nelice, sed li meritas almenaŭ trankvilan finon. Penu kompreni tion. Antaŭ ĉio temas pri li, sed ne pri vi aŭ pri mi. Pri li! Ĉu vi opinias, ke ekzistas almenaŭ unu ŝanco el mil? Tiam diru, kaj mi faros ĉion, por ke tiu ŝanco venku... Ĉu vi opinias, ke tiu ŝanco ekzistas?

– Ne... certe ne. Ankoraŭ antaŭ kelkaj horoj... Sed nun... ne. Nenio nun povas helpi al li. Kaj tamen mi ne scias kiel ekspliki al vi... Simple, dum tiuj ĉi tagoj mi komencis pli bone kompreni Allan-on. Li havas tian cerbon... Por ni ĉiuj estus pli bone, se li ekzistus en la mondo eĉ unu superfluan horon, eĉ se neniu iam ajn scius, pri kio li pensis dum tiu horo... Ĉu vi komprenas?

– Ne. Sed mi jam diris, ke mi lasas vin libera pri via agado. Finfine, tio estas afero de via konscienco. Ordoni al vi mi ne rajtas.

– Dankon. – Tavolsky malrapide stariĝis. Instinkte li provis forigi faldojn sur la dorso kaj, preminte enmane forsaltintan butonon, li eliris.

La ĉefkuracisto strebis ne rigardi lian kurbiĝintan dorson. Tamen li ne eltenis kaj deturnis sin de la fenestro. Tavolsky jam estis foririnta. Nur malrapide mallarĝiĝis la nigra pordobreĉo.

Tio memorigis ion al la ĉefkuracisto. En la brusto aperis ia premkora sento, nekomprenebla sopiro. Lin pikis penso, ke li vidas Tavolsky-n lastfoje. Tamen amaso da rutinaj zorgoj tuj foratentigis lin.

*La 8-a de aŭgusto 19**. Mateno. Temperaturo – 38,1. Pulso – 96. Sangopremo – 150/110*

“...fraŭlino R. tre miris, ekvidinte sian fraton sidi ĉe ŝia lito. “Strange, – ŝi pensis. – ja li loĝas trans la oceano kaj neniamaniere povas aperi ĉi tie”. Ŝi provis alparoli lin, sed la voĉo ne obeis. Kiam finfine ŝi ekregis sin kaj kapablis elbuŝigi kelkajn vortojn, li subite stariĝis, iris al la elektrokameno kaj degelis, kvazaŭ senkorpa fantomo. Matene fraŭlino R. rakontis al la familianoj pri tio, kio okazis,

kiam ŝi neatendite vekiĝis nokte. Ŝi aspektis tre ekscitita kaj kelkfoje ripetis, ke ŝin tre maltrankviligas la sano de la frato. Ĉiuj komencis konsoli la junan virinon, certigante, ke tio estis nur sonĝo.

Tamen post du tagoj venis telegramo, kiu informis, ke la frato de fraŭlino R. mortis ĝuste en tiu tago kaj horo, kiam ŝi vidis lin sidi ĉe ŝia lito."

Triviala historio. Kiomfoje aperadis similaĵoj en libroj, ĵurnaloj, sciencaj raportoj pri parapsikologio! Fraŭlino R. estis, verŝajne, unika stultulino. La siaspeca virta filistrino kun emo al histerio. En la tridekaj jaroj plivigliĝis aĝiotado ĉirkaŭ la nekrobiotikaj radioj. Poste ĉio trankviliĝis, sed la enigmo restis. Plej verŝajne, proksimuloj povas senti unu la alian distance. Sed kion faru tiuj milionoj, kiuj ne havas tiun kapablon? Aŭ damnon? Kion faru mi, se mi ne sentas Denizan? Kion faru Deniza, se ŝi eĉ ne konjektas, ke mi mortas? Estas facile kaj tre alloge rezigni tion. La fenomeno ne ekzistas, do estas fino. Sed se ĝi ekzistas? Se ĝuste nun aperis reala ebleco sendi al Deniza mian lastan "adiaŭ"?

Kia perfidema kaj flatema estaĵo estas Espero! Laŭ ĉiuj vojoj, sub ajnaj maskoj ĝi strebas penetri en nian animon. Sed mi ne bezonas la memkonsoladon, la dolĉan narkotaĵon. Tio nenion rezultigos. Elĉerpos tempon kaj fortojn, tamen ili eĉ sen tio malmultas.

Laboro de la cerbo estas vera savo! Mi pensas, sekve mi ekzistas... Ne! Mi ekzistas, ĉar mi pensas. La penso malaperas tuje, kvazaŭ fermiĝas ŝirmiloj en objektivo. Io mirakla forportas min malproksimen de la tero. Kaj tio estas jam ne mi, sed io, pli precize – nenio. Ĉio restas, nur mi nereveneble foriras, disŝutiĝas, perdas la akumulitan memoron. Morto estas perdo de la memoro. La korpo eĉ vivu kiel antaŭe, sed, se estas perdita la memoro, estas perdita ĉio. La morto venas, kiam mi ne povas konscii, ke mi mortis. Komence oni forgesos la voĉon, poste...

Stranga sento. Mi neniam antaŭe havis tiom da libera tempo, kiel nun. Ajnan penson mi povas pripensi ĝis la fino. Esplori ĝin de nebulaj zigzagaj elfluejoj ĝis bruaj akvofaloj, kiam ĝi falegas en la profundon de la memoro aŭ mortas en siblado de magnetofona bendo.

Sed foriĝas el la pensotorento iu rebrilo kaj trafas en la koron. Ĝi mem estas nenio, sed ĝi havas ion, kio vekas asociojn.

Homon direktas la estonteco... Ne iu klarvidulo kun freneze malfermitaj okuloj, stertoranta profeto aŭ mediumo. Simple, en iu tute moderna labo – ekzemple, tio okazas en la Princeton-Universitato de superaj esploroj – sidas juna simpatia doktoro. Li tuŝas butonojn de aparato kaj en respegulita neŭtrina radio vidas sin post kelkaj jaroj. Tio estas ne halucino, sed multfoje efektivigita kaj kontrolita eksperimento. Duboj forestas. Sed se li vidas sin, sekve... Li pretas oferi sin por la scienco, do li ne povas morti nun.

La fizikisto eligas el la tabla tirkesto pistolon, skrupule kontrolas la kartoĉujon. Altempiigas. Fermegas la okulojn kaj premas la ĉanon... Mispafo. Ankoraŭfoje! Denove mispafo.

Se mi estus verkisto, mi kreus ĝuste tiajn rakontojn.

Deniza! Ĉu vi memoras tiun verdan makulon de lumo, kaj la ondofrapojn, kaj

nevideblan nigran bordon, kaj la dancantajn fiŝojn? Mi, kvazaŭ fascinita fiŝo leviĝas kaj refalas kun la preterkurinta ondo. Ĉu vi memoras tiun nokton sur la kajo, Deniza? Lasta lumo, lasta freŝeco, kaj poste descendo en la malvarman mallumegon. Mi sonĝu vin, Deniza! Almenaŭ unu fojon mi sonĝu vin por adiaŭo... Kvazaŭ tio okazus nur hieraŭ. La brilanta nokto kaj frapoj de la ondoj.

Super la akvo glitas polvoza lazura radio. Ie la noktomezo anoncas sin per la sonoj de la ŝipa kloŝo. La fosforeskaj kankretoj elgrimpas al la bordo kaj komplotas kontraŭ sia mara prezidanto. Kaj en la ĉielo rotaciiĝas lazura polvo de stelaroj, kaj la brilaj steloj falas malsupren. Mi indulgos la grandan stelon. Ĉu vi memoras tiun nokton sur la tegmento, Deniza? Kien malaperis ĉio ĉi, en kiun senfundan abismon falis? Ĉu vere la pasinteco simple trafalas en la malplenon, en malvarman netravideblan maleston?

La 9-a de aŭgusto. Kabineto de kuracistoj.

– Ĉu Cowen jam forveturis? – La ĉefkuracisto fermis kranon kaj skuis siajn manojn super la lavtablo.

– Jam hieraŭ, – diris Tavolsky, etendante viŝtukon. – Fine li volis ekzameni Allan-on.

– Do?

– Ŝajne, la malsano eniras sian lastan stadion. Aperis iom kreskantaj kongestetoj.

– J-jes... Kion pri la hipotermio?

Tavolsky ŝultrumis kaj etendis brakon al la teko.

– De la administracio venis listo por la… dusemajnaj vizitoj. Necesas subskribi. Oni diris, ke vi rajtas fari iujn ajn ŝanĝojn enkadre de la antaŭkalkulado.

– Bone! Donu... Kiu nun vicas?

– Supera dozmezuristo Ŝulc, leŭtenanto de Friz, doktoro Skott, serĝento Hitawey, majoro Solk, doktoro Gudov, ŝoforo Pek, supera fajrestingisto Balager, doktoro Barton, soldato Tressi!

– Forstreku Hitawey-on. Al ni sufiĉas skandalo, kiun li okazigis la pasintan fojon. Same eliminu unu el la doktoroj. Intelektuloj eltenas tion ne tiom facile, kiel la ceteraj... Sole ili kaŝas siajn sentojn, sed se oni alvenos samtempe al ambaŭ... Ĉu vi komprenas? Forstreku iun por la estonta fojo.

– En la listo estas tri doktoroj.

– Ĉu vi konsideras Barton-on? Kompreneble li ne estas konsiderenda. Faru por li ĉion eblan... Tamen, mi memoras, vi informis, ke li ne havas proksimulojn, ĉu?

– Jes, sed... Jen, bonvolu vidi, mi preparis la paperon, kaj se vi ne oponas...

– Donu. – La ĉefkuracisto flue tralegis la dokumenton kaj indiferente alrigardis la plafonon. – Do, bone, – diris li post iom da tempo, – ni provu. Mi subskribos.

*La 9-a de aŭgusto 19**. Mateno. Temperaturo – 38,3. Pulso – 96. Sangopremo – 150/105*

– Renkontu gastojn, Allan! Ĉu vi ne kontraŭas?

– Mike! Lee! Teddy! Jen vera surprizo! Eniru. Sidiĝu, kie eblas... Komike vi aspektas, Lee, en tiu ĉi hospitala ĥalato! Flavo sur la verdo. Kvazaŭ citrono, sed ne homo.

– Vi restas la sama, Allan, – kviete ridetis Lee kaj nekuraĝe sidiĝis sur la randon de la lito.

– Nur ne sur la liton! – tuj reagis flegistino Beata. – Deflankiĝu pli malproksimen. Ĉiuj deflankiĝu.

Ŝi malŝaltis la ultraviolan ŝirmilon kaj mallevis la ekranon.

– Mi kuŝas ĉi tie kvazaŭ faraono en sarkofago, – mokridetis Barton. – Oni protektas eĉ kontraŭ polvero. Do, bacilhavuloj, kio estas nova?

– Nu, kio povas esti nova? – la malalta brunhaŭta Mike tuj salte stariĝis kaj ekpaŝadis en la ĉambro, grimacante kaj vigle gestadante. – Ŝajne ĉio samas. Novaĵoj fakte mankas. Ĉiuj atendas vin, do... – Li misspiris kaj eksilentis.

– Sufiĉe, Mike, – senĝoje ridetis Barton.

– Jes, sufiĉe, – kapklinis Teddy Wiegand, grandega kaj senemociema nuklefakulo.

– Interalie, ni ŝatus donaci al vi ion... – Mike ĵetis sin al la pordo.

– Halt'! Kien do? – provis haltigi lin Wiegand. Sed tiu jam malaperis en la koridoro.

– Mi timas, ke nia rendevuo estos iom prema, – daŭre ridetante diris Barton. – Mi bonege komprenas vin, amikoj, kaj sincere kunsentas. Kredu, mi hontas mian nunan situacion. Sed ankaŭ vi komprenu min... Ja nenion eblas fari. Tial ni lasu la falsan viglecon kaj damajn konsoladojn. Ili nur provokas hurlemon. Ni prefere parolu pri aferoj kaj senkonflikte adiaŭu. Ja ĉiu el ni pensas: nur pli rapide...

Mike revenis kun travidebla plasta kesteto, en kiu time sidis makulfela kobajo.

– Jen! – Li solene surplankigis la kesteton. – Tion petis transdoni al vi niaj knaboj el la biosektoro. Kiam ili eksciis pri la okazintaĵo, ili tuj aranĝis al ĉi kobajo mil kvincent rentgenojn. Poste ili komencis kuraci ĝin... Same kiel vin. Ili telefonis al Tavolsky ĉiutage. Imagu! Antaŭhieraŭ ĝia sango komencis ordiĝi... Nenio nun danĝeras al ĝi. Se vi deziras, ĝi loĝos ĉi tie, en via ĉambro.

Li levis la keston kaj direktis sin al Barton, sed lin haltigis flegistino Beata.

– Stop! – ŝi diris. – Metu jen tien, en la angulon... Ni ĉiuj zorgos pri ĝi. Kia ridinda, ĉarmulo! – Ŝi frapetis per ungeto la kestovandon, sed la kobajo ne moviĝis.

– Malfeliĉa estaĵo... – Barton deĵetis sin sur la kusenon, sentante, ke varmego inundas la vangojn. – Akvon!

La flegistino kaptis porcelanan teujon kaj zorgeme alproksimigis ĝin al la lipoj de la malsanulo.

– Tempas foriri, – ŝi diris, ne returniĝante. – Vidu kiel vi ekscitis lin.

– Ili restu ankoraŭ iomete, flegistino. – Barton prilekis siajn sekajn, inflamajn lipojn. – Danku de mi la biologojn, cetere ili estas grandskalaj idiotoj. Koncerne la kobajon, ĝi restu... Ĝi ne malhelpas al mi... Kion pri novaj klaĉoj, Teddy?

– Senklaĉe. Nur al Skott venis la edzino.

– Ĉu?

– Jes ja... Por du semajnoj.

– Do, kion pri li?

– Nenion.

– Al mi ŝajnas, ke mi kuŝas ĉi tie ekde la unuaj kreotagoj kaj viaj aferoj pasas tute alie, ĉio estas interesa kaj absolute neatingebla por mi. Evidentiĝas tamen, ke ĉe vi nenio okazas. Aŭ simple, vi ne scipovas rakonti, Teddy, ĉu ne?

– Ne. Cetere, mi ne scias, certe. Sed, vere, nenio estas notinda. Demandu al Mike aŭ jen Lee. Ili konfirmos.

– Bone. Mi kredas al vi. Ja vi ĉiam estis Demosteno, kiu hazarde tro enbuŝigis ŝtonojn. Estas bone, kiam nenio okazas.

– Pardonu?

– Ne, ne gravas. Ĉio enordas. Simple, mi laciĝis. Verŝajne necesas iom ripozi. Ja mi malkutimiĝis interparoli.

Ili tuj stariĝis por foriri. Longe kaj mallerte ili tumulte ek-ekpaŝis, kvazaŭ serĉante ion. Poste piedumis ĉe la pordo, balbutante iujn bagatelajn vortojn kaj stultmiene ridetante.

Barton ne retenis ilin.

La unua ne eltenis Mike. Li subite kurbiĝis, kvazaŭ malsana simio, sufokiĝis pro larmoj kaj elkuris. Barton vidis, ke la atleta dorso de Wiegand iĝis subite kompatinda kaj elokventa. Ŝajnis, ke ĝuste ĝi eligas tiun balbutadon, kiun tute ne kapablis Ted mem. Sed Barton ne kompatis la forirantojn. Li miris, konsciante, ke li entute havas neniujn sentojn. Ili ĵus entombigis lin dumvive, sed li sentis nek sopiron, nek ofendiĝon. Tamen eble tio okazis ne al li, sed al iu alia, tute ne konata?

Barton ekkonsciis subite, kian limon metis inter li kaj la ceteraj la proksimiĝanta morto. Li trafis trans limon. Ili dume nenion sciis, sed li jam sciis ion, kio tute ŝanĝas la vidpunktojn kaj la karakterojn de homoj. Ĝuste tial ili reagis al la samaj fenomenoj diversce. Li rigardis desur la alto de sia scio, la ceteraj – el la malhelaj breĉoj de neinformiteco kaj instinkta teruriĝo.

Foratentiĝo danĝeras, necesas koncentriĝi. Min ne koncernas eksteraj eventoj. Venis tempo deflankiĝi, malŝalti min. Necesas pensi nur pri la plej ĉefa, pri kio mi neniam sukcesis mediti en tiu, malproksima nun vivo. Aliaj taskoj, aliaj kriterioj. Ĉion, per kio mi vivis en la iama vanta vivo – for! Kaj nur pensoj-fluetoj, hazarde trafintaj en la kapon nokte, devas iĝi enhavo de la vivo. Kiam future nebulis multeco de jaroj, mi pensis pri bagateloj. Nun, du paŝojn antaŭ la malpleno, mi volas pensi pri eternaj valoroj. La homo estas ridinda estaĵo!

Scienculoj asertas, ke infanoj, naskitaj hodiaŭ, estas senmortaj. Ĉu la homaro efektive staras sojle de la eterneco? Estas domaĝe morti antaŭtage. Sed ĉiam iu mortis antaŭtage, trafita de lasta kuglo en la lasta tago de milito.

Tamen, ĉu mi rajtas juĝi pri la senmorteco? Mi, verŝajne, ĉion hipertrofie miskomprenas, malsanpense pligrandigas, komplikas. Mi havas tiom malmulte da tempo! Tiom malmulte...

Interese, je kio transformiĝos tiam malica koroda envio kaj stulta agresemo? Senmortulo bezonas pli multon... Kaj se nun ne haltigas la morto, do kio povos haltigi tiam? Kiam oni mencias senmortecon, mi pensas pri tute kontraŭaj aferoj.

La homoj foje ekkonis guston de la mortindustrio. Tio estas danĝera memoro. Ĝi ne povas forpasi senspure. Por ĝi oni devas pagi kaj pagi. Kiel spongo, ĝi ankoraŭ longtempe ensorbos kaj ensorbos sangon.

Kial do? Ĉu eble la homo estas malvirtema en sia esenco mem? Se ne, do kio provokas tiom teruran malracian difekton de la menso? Tio okazis, kiam mi ankoraŭ ne ekzistis, sed la memoro, fremda memoro de la pereintoj, ial trovis min. Jen kio mortigis min la unuan fojon. La cetero venis nur tial, ke mi jam estis morta... Certajn homojn tiu terura memoro instigis al lukto, kondukis al io hela kaj malproksima, la aliaj akceptis ĝin kiel stafeton de krimo. Kaj mi komprenis nur jenon – mediti ne licas. Mi ekmeditis, kiamaniere vivi plu, kaj ne trovis respondon. Vivi plu estas neeble. Eblas nur krii, vicpafi fenestrojn per mitraleto, ĵeti sin en akvon. Tiel ŝajnis al mi tiam. Neniam mi forgesos la tagon, kiam mi subite kun tute senindulga klareco komprenis, kio okazis al tiuj, kiuj jam delonge forpasis, kaj al ni ĉiuj. Oni min atingis, frapis en la ventran plekson kaj mortigis. Kie kaj kiam mi akiris la radimalsanon?!

Kaj nur nun klaras, kiel kuniĝas unuece la malproksima kaj neadmonebla rondo. Ies krimo ekrompis min, kaj mi ĉesis pensi. Mi ĉesis pensi kaj nerimarkeble enpaŝis la vojon, kiu kondukas al la sekva krimfaro. Kiom neadmonebla kaj senindulge simpla estas ĉio... Ja tiuj, kiuj kreis la koncentrejojn, la inferojn sur la tero, same komencis de io! Ili same en iu momento ĉesis pensi! Ĝuste en tio kernas la problemo. Ĉesante pensi, ni konvertiĝas je potencialaj krimuloj kaj komplicoj de krimagoj. Ĝuste tial ĉiuj tiranoj en ĉiuj epokoj strebis malkutimigi la homojn pensi. Laboriston kaj soldaton ne devas korodi la malsano de intelektismo. Oni devas labori, batali, sed ne pensi. De tio ĉiam komenciĝas la vojo al faŝismo. Kiom facilas obeigi homon! Ĉu nur propra katastrofo kapablas klarigi ĉion al li?

La 11-a de aŭgusto. Kabineto de la ĉefkuracisto.

– Do, kion pri la novaĵoj, kolego? – La ĉefkuracisto ridetadis kaj kontenteme frotetis la manojn. – Kion pri la novaĵoj? – denove demandis li, malfermante la fenestron. Elŝovinte sin eksteren, li brue enspiris la varman aeron. Poste li demetis la kolonelan kitelon, malstreĉis la kravaton.

– La lasta analizo de sera natrio montris teruran rezulton. La dozo estis, verŝajne, unu-du miloj da rentgenoj. En la sango rimarkeblas malpliiĝo de monocitoj kaj retikulacitoj.

– Tri-kvar tagoj, ne pli. Ĉu?

– Eble eĉ pli frue... Kion pri niaj paperoj?

– La generalo kontaktis la superan estraron. La permeson ni jam ricevis.

– Dankon, profesoro.

– Lasu, kolego, pro kio?

*La 11-a de aŭgusto 19**. Mateno. Temperaturo – 39,0. Pulso – 102. Sangopremo – 160/110*

Deniza! Tamen vi alvenis... Kiel vi eksentis, ke mi sopiras vin, Deniza? Ĉu vi min sonĝis nokte? Aŭ vi subite vidis min en homamaso, ekkuris al mi, dispuŝante ĉirkaŭantojn kaj stumblante, sed mi subite malaperis, degelis en la aero. Vi silentas... Vi mem degelos nun, foriros de mi. Dankon, ke vi venis almenaŭ por minuto. Mi febras, kaj vi simple venis al mi en deliro. Sed tutegale dankon.

Ĉu vi memoras nian stelon, Deniza? Mi ne malkovris al vi tiam, ke mi konas ĝin. Tio okazis ne en tiu ĉi vivo, en alia tempo, eĉ eble, en alia universo. La sovaĝgentaj indianoj, loĝantaj en Amazonio, de generacio al generacio transdonas la fabelon pri junulo kaj stelo. Vi scias ĝin. Vi nur ne konjektas, ke tio okazis ĝuste al ni en malproksima tempo.

Iam nokte mi rigardis la ĉielon kaj ekvidis tie lazuran stelon. Ĝi lumis kviete kaj hele, kaj trista radio ĝia penetris rekte en la animon. Mi enamiĝis al la stelo kaj, falinte sur la genuojn, vokis ĝin. Mi longe rigardis poste la ĉielon, sopirante la malvarman kaj helan stelon. Larmvizaĝe mi revenis en mian vigvamon kaj falis sur la maton. La tutan nokton sonĝis mi tiun belegan stelon. Kaj la sonĝo estis laciga kaj dolĉa pro iu mirinda realeco. Sed noktomeze mi subite vekiĝis. Ŝajnis al mi, ke iu rigardas min atente kaj longe. En la nigra ombro mi ekvidis junulinon kun blindige bluaj okuloj.

– Kiu estas vi? Foriru! Malaperu, – flustris mi time.

– Kial vi forpelas min? – mallaŭte kaj kviete demandis ŝi. – Ja mi estas tiu stelo, kiun vi volis kaŝi en vian kalabason. Ankaŭ steloj estas virinoj, kaj ili ne povas vivi sen amo kaj varmo.

Mi tiom ektimis, ke longe ne kapablis paroli kaj nur daŭre rigardis ŝin tra la larmoj.

– Sed al vi estos preme en mia kalabaso! – diris mi finfine, etendante al ŝi brakojn.

Ŝi kapneis, kaj la bluaj rebrilaĵoj ekglitis laŭ la kanmuroj.

“Sed al vi estos preme sur mia biciklo! Mi mem apenaŭ lokiĝas sur ĝi. Duope ni entute ne lokiĝos.

Vi kapneis kaj grimpis sur la biciklon. Kiom da jaroj vi aĝis tiam, Deniza? Ĉu dek du? Dek tri?”

Mi malfermis la kalabason kaj enlasis tien la stelan fraŭlinon. Mi havis nun la propran malgrandan ĉielon, desur kiu brilis la plej bela stelo.

Ekde tiam mi perdis la trankvilon. La tutajn tagojn mi vagis kaj konstante pensis pri la fraŭlino-stelo, kiun mi petis lasi la ĉielon. Kaj nokte ŝi eliradis el la malvasta kalabaso, kaj ĝis la aŭroro brilis ŝia beleco.

Foje ŝi vokis min ĉasi en la nokta arbaro. Ni longe iris kun ŝi laŭ arbaraj bestopadoj.

Tiamaniere ni atingis altan kaj sveltan palmon.

– Surgrimpu la palmon, – ŝi diris.

Mi obeeme grimpis, venkante la timon kaj ĉiusekunde riskante fali. Kaj, kiam

mi atingis jam la unuajn ripecajn foliojn, ŝi kriis demalsupre:

– Tenu vin! Nur firme tenu!

Kvazaŭ lazura kolibro, suprenflugis ŝi al la pinto kaj frapis la trunkon per branĉo. La palmo komencis plialtiĝi kaj tuŝis fine ĉielon. Ŝi ligis la palmon al la ĉielo kaj etendis al mi la manon. Singarde mi enpaŝis la ĉielon, sed kapo mia turniĝis.

Subite mi ekaŭdis muzikon. La viglajn sonojn de la ĝojiga danco, kiun oni plenumas post sukcesa ĉasado kontraŭ tapiro.

– Nur ne aŭdacu rigardi la dancojn! – ŝi diris, lasante min sola.

– Kial vi lasas min? – demandis mi, sed ŝi jam malaperis.

Kaj mi restis stari antaŭ la malpleno, kaj malantaŭe bruis la gaja danco kaj aŭdeblis rido. Ne havante forton reteni la scivolemon, mi retrorigardis. Tie dancaĉis skeletoj.

Mi sufokiĝis pro teruro kaj ekkuris en la malplenon. Sed tiam revenis ŝi kaj riproĉis min, pro mia malobeemo. Poste ŝi alportis akvon kaj komencis forlavadi blankajn makulojn, kiuj aperis sur mia korpo pro la terura dancado.

Ie sub mia koro malfermiĝis senemocia malpleno. Mi observis la ĉielon per larĝe malfermitaj nevidantaj okuloj kaj subite ekkuris al tiu loko, kie estis alligita la palmo. Mi frapis ties trunkon per la branĉo kaj rapide descendis al la tero.

Triste ŝi postrigardis min:

– Kial vi forkuras de mi? Egale vi nenion povos forgesi.

Ĉio efektiviĝis laŭ aŭguro de la stelo. Sur la tero mi spertis teruran nekuraceblan malsanon.

Kaj jen mi mortas, Deniza. Sed mi povas forgesi nenion.

Venu al Amazonio, Deniza. Tie en la centro mem de la indiana praarbaro fluas rivero Ŝingu. Trovu malgrandan fieran genton, kies nomo estas “ŝerente”, kaj vi scios la finon de la fabelo pri ni. Domaĝe mi ne sukcesis rakonti tiun fabelon ĝis la fino en tiu lasta vespero. Ĉu vi memoras? Mia avino estis ano de “ŝerente”, Deniza.

“Jen dank’ al tio la indianoj eksciis, ke tie, supre, ilin tute ne atendas beato, kvankam de tie lumas por ili steloj, karese logante al la ĉielo”, – resumis la fabelon mia ŝerentea avino.

Kial vi tiel rigardas min, Deniza? Viaj okuloj estas tute malplenaj. Malplenaj kvazaŭ la ĉielo. Kial vi ne ploras? Ĉu vi ne havas larmojn? Aŭ eble oni simple ne enmuntis al vi koncernan mikroskemon? Do kompreneble, ĉio klaras... Al kiu mi ŝuldas mian feliĉon? Ĉu al Tavolsky? Al la generalo? Al la estro de la milita departemento? Aŭ eble al vi, Deniza? Vi registriĝis kaj permesis kopii vin por la molekula karto. Por kio vi faris tion? Por kio?!

Cetere, kompreneblas... Vi tre sopiris. Vi ne sciis, ke mi mortas. Vi ne eltenis la solecon, Deniza.

Ne, ne tuŝu min. Mi parolas ne al ci, sed al Deniza, kiu simple ne eltenis la solecon kaj nun ploras hejme. Sed ci eĉ ne scipovas plori... Ci estas, verŝajne, surogatspeca, ĉu? Ĉu vere? La bonfaruloj decidis iomete ŝpari je mi... Jes, ili pravas,

ĉu indas tro peni pro la mizeraj du tagoj...

Do, vi ne eltenis, Deniza. Mi tre kompatas vin, kara. Bonŝanco ne venis al ni. Ni ne meritis tian fiaskon.

Sed por kio tia turmento? Por kio tia fiaĵo fine! Certe, ili volis bonfari. Tavolsky estas bonega knabo, sed kial li montris tian idiotecon? Kiun ili intencis trompi? Min? Min? Min?! Ne, mi ne deziras al vi, majoro pri medicina servo Tavolsky, tian finon. Ne deziras. Tiom maltalente fuŝi lastajn minutojn. Almenaŭ estimu la morton! Surogat-amo. Surogat-morto. Kia moroza kaj vulgara humuro! Sekve, la tuta socio, la tuta civilizacio estas nekuraceble malsana, se eblas tia malnobleco...

Forigu do tiun pupon de mi! Forigu-u-u-u!..

*La 11-a de aŭgusto 19**. Tagmezo. Temperaturo – 40,2. Pulso senordas (komata stato).*

Kapitano pri medicina servo Tonny Weisz. Mi petas vin eliri en la koridoron, sinjorino. Mi devas sciigi al vi ion gravan.

(Deniza postssekvas Tonny el la ĉambro.)

Tonny Weisz. Provu forgesi ĉion, kion vi vidis kaj aŭdis ĉi tie. Allan... li... misrekonis vin. Ni havas spertajn psikiatrojn, ili helpos al vi forgesi ĉion. Vi estas juna dume, vi devas vivi. La nuntempa scienco kapablas krei mirindaĵojn... Pardonu min pro ioma maltrankviliĝo... La afero estas en tio, ke mi ne tute pretas konversacii kun vi. Min petis majoro Tavolsky, li... hm... ege laciĝis kaj rifuz... petis, ke mi iom da tempo anstataŭ li... Via fianĉo, sinjorino, tre grave servis al la patrujo. Doktoro Barton estis... estas! Li estas nacia heroo. Tial la registaro faris ĉion eblan, por... Unuvorte, tuj vi vidos mem. Mi petas vin enbuŝigi tiun ĉi tablojdon. Tute sendanĝera kuracilo, kiu preventos la koron kontraŭ emocia ŝoko... Kaj nun bonvolu trairi en tiun ĉambron.

(Tonny malfermas la pordon kaj enlasas Denizan antaŭen. Ŝi faras du paŝojn – kaj tuj haltas sur la sojlo. Ridetante, kun la etenditaj brakoj renkonte al ŝi iras Allan Barton. Li estas juna, gajvizaĝa, svelta, kaj lia aspekto tute ne ŝanĝiĝis post tiu tago, kiam ili adiaŭis en la flughaveno.)

Deniza. Kia fieco! Tio kontraŭas la Homan Animon mem!

Tonny Weisz. Haltu, sinjorino! Kial vi foriras? Sed kion fari... al ĝi?..

Deniza. Resendu ĝin pere de l' kompetentaj kanaloj... Kaj estu malbenitaj!

Tonny Weisz. Kion?

Deniza. Estu vi ĉiuj malbenitaj!

(En la koridoron enkuras flegistino Beata.)

Flegistino Beata. *(al Tonny Weisz)* Rapidu, doktoro! Profesoro Tavolsky ĵus injektis al si morfinon! Pli multe ol kutime, mi petegas vin... rapidu!

Elrusigis Svetlana Pogorelaja (Ukrainio)
kaj Ruslan Mavljudov (Kazaĥio)

FORPASOJ...

MARJORIE BOULTON

La 30-an de aŭgusto 2017 forpasis d-rino Marjorie Boulton. Marjorie Boulton (naskiĝis la 7-an de majo 1924) doktoriĝis pri literaturscienco en 1948. La postan jaron ŝi lernis Esperanton. Ŝi debutis kiel Esperanta verkisto i.a. en la Belartaj Konkursoj de UEA. En 1958 ŝi estis la unua ricevanto de la *Arĝenta Sprono* de la eldonejo *Koko*. Boulton oficis kiel sekretario de Internacia Somera Universitato (1957-1962), de la Internacia Ekzameno (1961-1967) kaj prezidanto de Societo de Britaj Esperanto-Instruistoj (1969). Ekde 1967 ŝi estis membro de la Akademio de Esperanto. En 1998 ŝi ricevis la Esperanto-Kulturpremion de la urbo Aalen, de la *FAME-fondaĵo*, en 2004 la premion *Deguĉi*, en 2014 la premion de la *Fondaĵo Grabowski*. Ekster la Esperanto-movado Marjorie Boulton estis vaste konata kiel verkinto de didaktikaj libroj pri literaturo.

La plej gravaj Esperantaj verkoj de Boulton estas *Kontralte* (1955), poezio; *Cent ĝojkantoj*, (1957, 1977), poemoj; *Virino ĉe landlimo: Drameto kaj skeĉoj* (1959); *Eroj kaj aliaj poemoj* (1959); *Zamenhof, Creator of Esperanto* (1960, 1980), anglalingva bibliografio; *Zamenhof, aŭtoro de Esperanto* (1962); *Dek du piedetoj* (1964), noveloj; *Okuloj: novelaro* (1967); *Nia sango* (1970), teatraĵo; *Rimleteroj* (1976), poemaro kun William Auld; *Poeto fajrakora: la verkaro de Julio Baghy* (1983), literatura studo; *Faktoj kaj fantazioj* (1984), prestiĝa legolibro; *Ne nur leteroj de plum-amikoj: Esperanta literaturo – fenomeno unika* (1984); *Du el* (1985), poemaro kun Poul Thorsen; *Lumo, mallumo kaj kelkaj memoroj* (2005), eseo. En 1999 aperis, sub la redaktado de Vilmos Benczik, festlibro: *Lingva Arto. Jubilea libro omaĝe al Wiliam Auld kaj Marjorie Boulton.*

En 1985 ŝi estis elektita kiel Honora Membro de UEA.

Gazetaraj Komunikoj de UEA



ALEKSANDR KOTELNIKOV

La 2-an de septembro 2017 en 61-jara aĝo forpasis membro de REU Aleksandr Konstantinoviĉ Kotelnikov, bone konata tra tuta Sovetio kaj Rusio multjara aktivulo de la E-movado en la urbo Volgograd, iama SEJM-aktivulo, fondinto de E-grupo en Volgodonsko. Ni elanime kondolencas al la parencoj, amikoj, samklubanoj, kamaradoj.

REU-Estraro



REU ESTABLAS LA FONDUSON "SUBTENO DE LABORO PRI LA VORTARO DE B. KONDRATJEV"!

Laboro pri vortaro estas malfacila tasko, kiu postulas multajn fortojn kaj monelspezojn. Dum longaj jaroj Boris Kondratjev kun nemultaj helpantoj abnegacie faras tian laboron, kreante la plej uzatan hodiaŭ Esperanto-rusan kaj rus-Esperantan vortaron – vidu ĉe <http://eoru.ru/> kaj <http://rueo.ru/>.

Ni proponas subteni ilian laboron pri la vortaro kaj pri ĝia paĝaro kaj establas fonduson por tio. Vi povas donaci kiom vi volas, ekzemple 10, 100, 1000 rublojn, aŭ iun alian sumon, kiu ne estos tro peza por via monujo. El multaj donacoj kunmetiĝos forta subteno. Aliĝu ankaŭ vi!

La kolektatan monon ni sendados al la teamo de B. Kondratjev. La nomojn de donacintoj ni planas publikigi en "Novaĵoj" en REU-paĝaro. La mondonacojn ĝiru al la kasisto de REU (la pagmanierojn kaj kontaktojn vidu ĉe <http://reu.ru/paghoj/pagmanieroj_eo.html>). Post la ĝiro nepre skribu al la kasisto retpoŝt- aŭ SMS-mesaĝon, kie indiku, kiu vi estas kaj ke vi ĝiris monon en la fonduson por Kondratjev-vortaro. Provizora regularo pri la Fonduso troveblas ĉe <http://reu.ru/prenu/regularo_pri_kondratjev_fonduso.pdf>.

<moskvo>

Estimataj abonantoj kaj legantoj de REGo!

Vi tenas en la manoj la vican numeron de la gazeto. La sekva numero, la 103-a, aperos en la decembro aŭ januaro kaj fermos la ĉi-jaran kolekton. Sed ĝi fermos ankaŭ la tutan historion de Rusia E-Gazeto. Kun bedaŭro mi devas informi, ke decidis ne plu daŭrigi preparadon kaj eldonadon de la gazeto. Nuntempe ĝi jam perdis iaman signifon kaj valoron por la rusia E-movado. En la moderna mondo preskaŭ ĉio, kion liveradis REGo al la abonantoj (novaĵoj, informoj, artikoloj kaj eĉ beletraĵoj) pli rapide kaj efike atingas esperantistojn pere de Interreto, kiun jam posedas preskaŭ ĉiuj gesamideanoj. Por fari en nunaj kondiĉoj vere interesan kaj utilan paperforman periodaĵon oni bezonas elspezi signife pli multajn fortojn, tempon kaj rimedojn, ol mi (kaj aliaj kunlaborantoj) povas disponigi por ĝi. Transformi REGon al reta periodaĵo mi ne volas, ĉar estas ĝisosta adepto de paperaj libroj kaj gazetoj. Mi deziras al ĉiuj E-periodaĵoj (retaj kaj paperaj) longan ekziston kaj prosperon, al iliaj eldonantoj – eltenemon kaj sukcesojn!

Georgij Kokolija